6-a Jaro. N-o 295 APERAS  SEMAJNE Leipzig, 29./5. 1930

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Kolmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerfiner

HINDIO KAJ LA HINDOJ

Unu el la plej gravaj problemoj sur la soci-politika kampo estas certe la nuna ribela situacio en Hindio. Tial ni hodiaŭ denove aperigas materialon pri tiu demando, kun la certo, ke niaj legantoj bonakceptos ĝin. — Red.

Depost la du jarcentoj, dum kiuj Hindio estas submetita al la brita superregado, ĝi estis por Granda Britio la plej altvalora k plej riĉa ekspluatejo. Tial la zorgo konservi tiun ĉi grandegan imperion, kie britaj komercistoj ĉerpadis riĉojn, teni fortajn interkomunikojn inter Hindio k la metropolo, estis la angla politiko depost la dek-oka jarcento. La granda duelo, kiu ludiĝas antaŭ niaj okuloj, inter la tradicia brita imperialismo k la defendantoj de l' hinda sendependeco, meritas esti komentata per geografiaj, historiaj k ekonomiaj konsideroj. Tial ni refoje dediĉas ioman spacon al tiu problemo.

Ne sen malfaciloj Anglio okupis Hindion en la 18. jarcento. Ĝi devis unue forpeli la francojn tie instaliĝintajn. Poste ĝi devis apliki, en tiu lando dividita en malgrandajn princlandojn sendependajn k ofte inter si disputantajn, politikon serpentuman, tiam flekseblan k tiam brutan. Tiel ĝi povis utiligi por sia profito la malkonsentojn inter la hindoj mem k plifortigadi sian povon sur ĉiam pli grandan teritorion.

Dekomence por Britio la profitoj el Hindio jam estis konsiderindaj, kvankam temis nur pri komerco per krudmaterialoj (kiuj lastaj poste servas al la disvolviĝanta enlanda industrio). Grandegaj "hindiaj riĉoj", ŝuldataj al senhonta elrabado k ekspluatado al la loĝantaro, amasiĝis k kunhelpis komence de l' 18. jarcento envojiĝi en Anglio la "industrian revolucion". Ĝuste tiuj ĉi kapitaloj grandparte permesis en Britio la ilprovizadon al minejoj, metal- k teksfabrikoj, kiuj certigis al Grand-Britio sur ĉiuj mondmerkatoj veran industrian superregadon.



HINDIA PEJZAĜO. Lignogravuraĵo de hinda artisto Manabendrabath Chikravarti.

Sed krom per la kapitaloj Hindio servis al Anglio per sia kotonliverado al la Lenkeŝeraj (*Lankashire*-aj) fabrikoj k tiela ebligo de l' Menĉestra (*Manchester*-a) ŝtof-eksporto. Grand-Britio ekestis danĝera konkuranto rilate al la teksaĵ-eksporto. Necesis malfermi disvendejon hindian al anglaj kotonaĵoj. Dume la hinda importo en Anglion falis rapide pro protektimpostoj. Hindio tiel perdis sian industrian aktivecon. La urboj estis forlasataj k la terkulturo fariĝis la preskaŭ ekskluziva okupo de l' loĝantoj.

Sed en jaroj 1875/80 la hindia ekonomio eniras novan periodon. Britio komencas instali en Hindio britajn fabrikojn per anglaj monsumoj, direktatajn de britoj. En 1916 oni taksis jam la britan kapitalon investitan en entreprenoj sur hinda teritorio je pli ol 390 milionoj da sterlingoj (= ĉ. 1 950 milionoj da dolaroj). Oni povas diri, ke Hindio pagas jare en la Unuigita Reĝlando pli ol 30 milionojn da st. (= ĉ. 150 mil. da dol.) al siaj kreditoroj, akciposedantoj, ŝtatoficistoj.

Tiel transformiĝas la aspekto de l' lando. Anglio enportas ĉiujn karakterizaĵojn de l' okcidenta civilizo. Ĝi ne nur eltiras komercajn profitojn per la hindiaj produktoj; ĝi modifas profunde landon esence tradicieman, kiu ŝajnas speciale ribelema kontraŭ eŭropaj konceptoj.

Apud la brita Hindio ni trovas la Hindion de l' Princoj kun 700 ŝtatoj sur du duono da milionoj da kvadratkilometroj kun pli ol 70 milionoj da loĝantoj. Por etendi pli vasten sian regadon, Anglio aplikis la faman devizon: "Dividu por regi". Ĝi kontraŭstarigis princon kontraŭ princo, ŝtaton kontraŭ ŝtato. Tamen hodiaŭ Hindio estas malpli dividita ol ĝi estis antaŭ du jarcentoj, dank' al la enkonduko de l' okcidenta tekniko: fervojo (60-mil-kilometra), aŭtomobilo, telegrafo, telefono, radio. La rapidaj transportrimedoj interalproksimigis la hindajn popolojn, same kiel tiujn de Eŭropo. Ankaŭ la lingvo de l' konkeranto servis por nacia unuigo. La diversregionaj hindoj por sin inter-

komprenigi ne uzas siajn dialektojn, sed la anglan lingvon.

Fine, la hinduismo, la reganta religio en Hindio kun ĉ. 200 milionoj da adeptoj, estis potenca unuiga elemento: el la religia ideo la bramanoj naskis la nacian ideon. Ili komprenis, ke ilia lando estas grandega maŝino turniĝanta je profito de l' fremduloj. Ankaŭ en la indiĝenaj rondoj la industria spirito faris rapidajn progresojn. Kelkaj enlandaj kapitalistoj, instruitaj en universitatoj de Anglio, aŭ en teknikaj lernejoj anglaj en Hindio, konatiĝis kun la tendencoj de moderna komerc-entrepreno. Iuj ekfondis fabrikojn, komercajn firmojn laŭ eŭropa maniero. Estas hinda familio Tata, kiu kreis metalindustrion en Hindio komence de l' 20. jarcento k okupas 44 500 hindajn k 200 eŭropajn laboristojn. Sed kompreneble ne estas tiaj naciistoj, kiuj lojale subtenas la nacian ribelmovadon: ili restas funde en bona interkonsento kun la eŭropa kapitalismo, kun kiu ilin ligas la klasinteresoj.

La popola nacimovado naskiĝis el aliaj fontoj, ĝi konformiĝis al la malnova hinda civilizo, tendencas protekti la hindajn laboristojn kontraŭ mizerego k malsato k por tio celas restarigi la de l' grandindustrio mortigitajn metiojn. Oni konas la signalvortojn de *Gandhi:* civitana malobeo, rifuzo de kunlaborado kun la britaj estraroj, bojkoto al britaj varoj, salproduktado kiel protesto kontraŭ la sal-imposto — estas senescepte senperfortaj rimedoj. Kiel instruas la plej freŝdata historio, Gandhi ne ĉiam sukcesis gardi la disciplinon k trankvilon ĉe siaj manifestacioj, kiel planite. Sed oni devas noti, ke eĉ la okazintaj perfortaj ribeloj neniel estas esprimo de klasa, sed nur de nacia batalo. Certe ekzistas la klasbatalo en Hindio same kiel ĉie. Sed ĝi ne leviĝis ĝis la ŝtupo de l' klaskonscio. Estus erare prezenti la nunajn hindiajn okazaĵojn kiel batalon kontraŭ la kapitalismo. La ideoj de Gandhi superregas ĝenerale . . .

La amasoj postulas esence plivastigon de l' politikaj rajtoj akiritaj en 1919, ĝis pli malpli kompleta sendependeco. Ili estas subtenataj en tio de ĉiuj "hindaj kolonioj" en Sudafriko, Orientafriko, Fidĵi-insuloj ktp. La venontaj jaroj estos decidaj por la solvo de l' problemoj ĉu Hindio restos grandega ŝtato kun centriga tendenco, aŭ ĉu male ĝi decentriĝos per dispeciĝo en provincajn ŝtatetojn. La sola, kion oni povas arde deziri, estas, ke la laborista movado, ĝiaj organizoj, pli forte ol ĝis nun penetru en la landon k montru la vojon al vera socia liberiĝo, ŝultro apud ŝultro kun la fratoj en tutmondo.

Ĉu vi jam pagis vian kotizon por la jaro 1930? Se ne, tuj faru tion!

EL LA LANDO DE LA X-a SAT-KONGRESO

Koopera klerigado

Nuntempe en Britio atingis tre grandan amplekson vasta organizo, nome la Kooperativa Movado. Tiom multe, ke ĝiaj disbranĉiĝoj enpenetris preskaŭ ĉiun urbon k urbeton en la lando. Nekontraŭdireble ĝi estas frapanta monumento pri la kapablo de la laboristaro en la administrado de komunaj entreprenoj.



La Kooperativa Pogrand-Asocia Magazeno en Leman-strato, Londono

Ĉi tiu granda asocio konsistas el kelkaj pograndaj asocioj aŭ kompanioj k pli ol 1400 pomalgrandaj asocioj distribuaj: ĉi lastaj okupiĝas ĉefe pri la provizado k vendado de vivnecesaĵoj al la milionoj da konsumantoj, kiuj aniĝas k kiuj tiele partoprenas la avantaĝojn k profiton rezulte el komuna komercado; k tiuj avantaĝoj sendube estas multnombraj.

Krom tio, ke ĉiuj ĉi distribuaj asocioj estas ligitaj en la Kooperativa Unuiĝo, ili estas tute apartaj k memstaraj. Kompreneble ĉiuj plenumas en siaj komercaj entreprenoj larĝsence la principojn de kooperado (bedaŭrinde estas fakto, ke ĉe la direkcio k la anoj la dividendo verŝajne estas pli grava ol principoj) — sed samtempe ĉiu asocio kompilas regularon k programojn diversajn laŭvole en sia propra kadro.

Estas tute okulvideble, ke ju pli granda la aparta asocio, des pli ampleksaj k multnombraj la faritaĵoj k faciligoj, kiujn ĝi povas doni al la membraro: tiurilate la plej famkonata k unu el la plej progresemaj estas la Londona Distribua Asocio Pomalgranda, kies komercaj k sociaj aktivoj funkcias en tiu parto de la urbego norde de la rivero Tamizo — sur areo da 480 kvadrat-kilometroj. Ĝi ankaŭ estas la plej granda komerca asocio distribua tra la tuta mondo.

En la sociaj rilatoj de ĉi tiu granda asocio la membroj celas atingi apartajn idealojn, ĉi-okaze kooperativajn. Tial, por ke oni pli bone efektivigu la de multaj homoj ege sopiratan kooperativan ŝtaton, troviĝas en ĉi tiu asocio fako de klerigado, efektive la plej grava el ties multaj entreprenoj; nur per la disvastigo de siaj principoj povas kreski la organizo.

Ĉiujare 5% el la komercaj profitoj de la asocio oni transigas al la Komitato de Klerigado por la plenumado de kleriglaboro, k ĝis nun la rezultoj estis tre sukcesoplenaj k kuraĝigaj, tiele farante bonan aŭguron al estonta evoluado: pli ol 50 kursojn pri sociaj temoj oni aranĝas por membroj k iliaj familianoj, komenciĝantajn ĉiujare je la fino de septembro, daŭrantajn ĝis la fino de junio; ankaŭ kelkajn teknikajn kursojn, ĉefe por la vendistoj en la magazenoj. Laŭ la programo oni rimarkas, ke la temoj estas diversaj, interesaj k aktualaj: ekzemple — "Reklamado k dramliteraturo", "Distrikta administrado", "Modernaj problemoj", "Ekonomio", "Industria Historio", "Angla Literaturo", "Kooperado", "Psikologio", "Socia Historio" k la plej grava el ĉiuj, "Esperanto".

Ĉiu rajtas tiri utilon el la suprecititaj kursoj, kondiĉe ke li (ŝi) estas membro de la Londona Asocio aŭ familiano kooperativa k 18-jara. Kursojn oni starigas laŭ minimuma bazo de 15 personoj; la instruistoj tenas diplomojn je la temoj apartaj, kiujn ili instruas. Ĉiujare troviĝas 10 esperantaj kursoj en diversaj lokoj. En la nordokcidenta kvartalo de Londono estas du sub

gvidado de du SAT-anoj! Kaj rezulte estas starigita vigla LEA-grupo, el kies membraro kelkaj jam fariĝas SAT-anoj. Ĉe la dungitoj de la Asocio, ĉefe la oficistoj k vendistoj, la temoj estas librotenado k la arto de vendado. Je la fino de ĉiu kurso oni okazigas ekzamenon, k la lernanto gajninta plej multe da poentoj ricevas kiel premion la rajton pasigi semajnan libertempon en la ĉiujare malfermata somera libertempodomo kutime apudmara, aŭ alternative ricevi librojn ĝis la valoro de unu funto sterlinga (= ĉ. 5 dolaroj).

Mi volas atentigi, ke la lernantoj efektive ricevas senpage la instruadon; unue ĉiu pagas 2 ŝilingojn, sed kondiĉe ke tiu persono ĉeestos je 75% al la tuta kurso, oni redonas la kurspagon. Lern- k legolibrojn la lernanto mem devas aĉeti; la plej multajn el la kursoj la asocio aranĝos kune kun la *Laborista Edukada Asocio* (angle: W. E. A.).

Pliaj entreprenoj edukaj troviĝas ĉe infanoj pli junaĝaj — de 8- ĝis 12-jaraj — k ĉe la pli aĝaj — de 12- ĝis 16-jaraj. Oni nomas ilin "Infanaj Rondoj". Por la gejunularo, en aĝo de 16 ĝis 25 jaroj, ekzistas similaj rondoj, studklasoj funkciantaj ĉiu-dusemajne. Ĉi tiuj estas gvidataj de spertuloj k la temoj instruataj estas aktualaj k progresemaj, kiaj "Ekonomio", "Civitaneco", "Parolarto", "Dramarto", "Publika Parolado" k. a., kiuj konsistigas la programon. La celo en ĉi tiuj rondoj estas enradikigi ĉe la gejunularo la verajn principojn kooperativajn pere de lecionoj, ludoj, k distrado, ankaŭ instrui la historion de la movado.

La granda sukceso, kiu nedisputeble rezultis el la kleriga laboro, grandparte estas pro tio, ke la kvar asocioj, kiuj servas la tutajn Londonajn distriktojn, kunlaboras en ĉiuj ĉi edukaj entreprenoj: ne mankas signoj, ke estonta evoluado efektivigos ankoraŭ pluajn kontentigajn rezultojn.

Sed alia flanko de la entreprenema agado de ĉi tiu movado k kredeble ties plej vasta influpovo konsistas en tiu, farata de la diversaj muzikasocioj — ĥoroj k orkestroj. De la komenco de l' aŭtuno ĝis la fino de marto la Klerigkomitato aranĝas koncertkunvenojn en diversaj lokoj: por ĉi tiuj koncertoj nur la unuaklasaj talentoplenaj artistoj estas dungataj. Krom la multaj muzikpartoj sur la programo, parolanto lekcias pri la celoj de la kooperativa movado k la profitoj haveblaj per ĝi. Dum ĉi tiuj koncertoj unuavice celas eduki la membraron al gusto por bonkvalita muziko, samtempe ili donas tre ŝatatan distron k pro tio ĉiam altiras ĉeestantaron grandnombran.

La ĥoroj estas dugradaj, unu por la pliaĝuloj, alia por la malpliaĝuloj: klasojn oni starigas ankaŭ por la instruo al la kantistoj. En majo la Klerigkomitato okazigas grandiozan feston ĥoran en la Kristal-Palaco (angle: *Crystal Palace*), en kiu konkursas la diversaj ĥor-asocioj, el kiuj la plej lerta ricevas premion.

Alia asocio tre simila, ankaŭ kleriga, estas la kooperativa Dramfederacio, sub kies gvidado lastan aŭtunon oni aranĝis semajnfinan lernejon, kiu daŭris du tagojn. La instruado donita konsistis el lekcioj de geviroj famkonataj en la brita dramistaro, kun elĉerpoj el teatraĵoj prezentitaj de dramgrupoj, kiujn kritikis k aljuĝis la sekretario de la Brita Dramligo.

Multnombraj estas la temoj, kiuj troviĝas vive gravaj al kooperativaj idealoj k kies rilatojn oni ne povas malatenti. Por ke oni diskutu tiujn diversajn aferojn, la Klerigkomitato aranĝas de tempo al tempo konferencojn, en kiuj la ordinaraj membroj k organiz-reprezentantoj rajtas partopreni. La temoj estas sufiĉe ampleksaj; mi citu kelkajn: "Agrikulturo k la Kooperativa Movado", "La Internacia Banko", "Problemoj de Kooperativa Demokrateco", "Instruistoj k Instrumetodoj" k. a. Oni konsentos, ke la temoj ja estas gravaj k diskutindaj.

Fine la kooperativaj gildoj, apartaj organizoj en la kadro de la asocio, kune kun la Klerigkomitato ludas tre gravan rolon en la disvastigo k diskonigo de la Londona asocio: ili servas por ambaŭ seksoj k sume nombras je 136. Ilia celo estas stimuli k pligrandigi intereson en la funkciado de la movado k inspiri la kooperativajn principojn inter la membraro. Ĉi tiuj gildoj kontinue aranĝas siajn ĉiujarajn kongresojn, k eble interesos la legantojn de "S-ulo" scii, ke en la jaro 1927 ĉe la Kongreso de Virinaj Gildoj oni proponis k unuanime akceptis rezolucion, ke esperanto estu deviga temo en la elementaj lernejoj en Anglio.

Jen sufiĉe ampleksa prezento pri la entreprenoj de la klerigfako de la plej granda asocio kooperativa, kiu provizas la vivnecesaĵojn al preskaŭ miliono el la brita loĝantaro. Ke la laboro jam farita k nun farata estas bona ekzemplo de praktika kooperismo, neniu povas nei, sed aparte de tio naskiĝis la demando, ĉu la asocio vere progresas survoje al la efektivigo de la komuna ŝtato, aŭ ĉu ĝi fariĝas nur grandega sukcesoplena komerca asocio? Ĉu la membroj ŝatas la laboron de la movado nur ĝis kiom ili ricevas la necesajn personajn profitojn? Tio estas demando, kiun mi eble pritraktos alian fojon.

Ofiro.

Redakcia Atentigo

Ni ricevis refoje plurajn leterojn, por kiuj ni devus pagi punafrankon k kiujn akcepti ni tial rifuzis. Ni jam sufiĉe ofte atentigis pri tio en "S-ulo" k ankaŭ aliaj K-doj skribis pri la sama temo. Bonvolu finfine atenti pri la afero k agi laŭ tio!



Pensoj pri la teroro

Subite la reakciuloj en Aŭstrio eltrovis sian emon por "opinia libero" k enparlamentigis projekton de kontraŭterora leĝo, laŭ kiu ĉiuj laboristoj estas punotaj, kiuj devigas aliajn laboristojn, aliĝi al iuj sindikato aŭ organizo. Nome ĝis nun en kelkaj fabrikoj la laboristoj rifuzis labori kun neorganizitoj k tio ne plaĉas al la entreprenistoj. Oni deziras "libere" dungi novajn gelaboristojn k tiele plimalgrandigi la salajrojn. Aliflanke en la ferminejoj de Stirio la laboristoj estas perforte apartenigataj al la f a ŝ i s m a organizo; kiu ne volas aliĝi, tuj estas maldungata. Sed tio ne signifas teroron; nur se laboristoj defendas siajn rajtojn. Tial la faŝistoj esperas profiti el tiu leĝo, ĉar ilia teroro estas nevidebla. En kazo de maldungoj la fabrikistoj ja ne konfesos la ĝustan motivon, sed deklaros, ke mankos laboro. Kiu povus kontroli aŭ pruvi, ke la vera motivo estas la rifuzo, aliĝi al la faŝisma organizo?

La socialdemokrataj delegitoj proponis en la parlamento, ke tiu leĝo, se oni akceptos ĝin, ankaŭ malpermesu la teroron de kapitalistoj, kiuj mem uzas perforton, por ke ĉiuj sammetiaj entreprenistoj apartenu al la koncerna industriista organizo k eĉ ne hezitas detrui la ekziston de eksteruloj. Se iu negocisto intencas vendi siajn produktojn malpli multekoste, la aliaj (organizitaj) negocistoj ekbatalas kontraŭ li, organizas bojkoton, malebligas al li ricevon de kredito k ne ripozas, ĝis tiu "blanka korvo" estas ruinigita. Ĉu tio ne estas teroro? Aŭ se la kapitalistoj, eĉ internaciskale, interkonsentas pri la komunaj prezoj, ĉu ili per tio ne teroras la konsumantojn? Ĉu nur la "teroro" de laboristoj estas

HENRI BARBUSSE

Eklumo en la abismo

Kun antaŭparolo de la aŭtoro al la esperanta eldono.

Sub la freŝaj impresoj de la mondmilito la fama aŭtoro verkis tiun ĉi plaĉe prezentitan 96-paĝan verketon. Forta protesto kontraŭ la milito, esploro de ĝiaj radikoj kaj pasia kulpigo al la kapitalista sistemo! Ni rekomendas la libron varme al ĉiuj K-doj, kiuj iom perfektiĝis en nia lingvo kaj volas ĝui meditigan legaĵon.

Havebla ĉe Administr. de SAT

PREZO: **0,80** mk. g.

puninda, sed ne la pli akra k pli danĝera perforto de la karteloj k trustoj?

Tiu afero montras, ke pri la signifo de la vorto "teroro" ne regas la necesa klaro. Ni konstatas, ke lastatempe ĝuste tiuj medioj protestas kontraŭ teroro, kiuj mem uzadas ĝin k nur tiumomente kontraŭparolas, kiam oni ekmalhelpas ilian teroron. Dum centoj da jaroj la eklezioj teroris la homojn, sed ĉar en Sovetio la popolo tion ne plu toleras, la papo lamentas, ke la religio estas persekutata. Ĉu li forgesis, ke la katolika eklezio per la plej kruela teroro ekstermis la idolan religion de la prauloj k per fajro k glavo "enkondukis" la kristanismon; ni nur memoru pri la terurajôj de la inkvizicio k kontraŭreformacio!

La kapitalisma sistemo ĉiam preparas konfuzon rilate al la ideoj. Oni gloras la "patrujon", sed samtempe diverslandaj kapitalistoj interkonsentas pri reciproka liverado de armiloj k milita materialo. Oni defendas la okcidenteŭropan "kulturon" kontraŭ la bolŝevismo, prisilentante, ke la socialismo (tiuokaze nomata bolŝevismo) entenas pli da kulturo ol la detruinda kapitalisma civilizo. La kapitalismo teroras la homaron en intereso de malplimulto, de la potenculoj, sed tion vualas la reganta klaso. Tial ni devas malkonfuzi la difinajôjn pri politiko, ekonomio, demokratio, teroro k ni facile ekkonas, ke la teroro nur tiam malaperos, se regos la plimulto, la proletaro. La kapitalisma sociordo ne povas malhavi la teroron k paco inter la klasoj, demokratio, ne ekzistas.

F. S., Vieno.

EL USONA TAGLIBRO

Unufoje dum jaro la plej grava ĵurnalo "New York Times *(Tempo de Novjorko)* ekkonscias pri malriĉo. Per longaj artikoloj ĉe Kristnasko ĝi aranĝas kolekton de proksimuma sumo de 300 mil dolaroj por tiuj, kiuj pleje bezonas helpon. En la libroj de l' profesiaj almoz-asocioj ĉiam registriĝas miloj da mizeruloj en ĉi tiu plej riĉa urbo de la mondo. El tiuj miloj la "N. Y. T." subvenciis ĉi-jare nur al 415 personoj. Sed la publika konscienco denove povas dormi. Oni ree povas paroli ĉefartikole pri multo da aŭtoj, sapo, bankuvoj, telefonoj ktp. Oficiale la senlaboreco ne ekzistas ĉi tie, ĉar nenia asekur-sistemo funkcias, sekve ne necesas statistiki la senlaborulojn. Diversaj spertuloj taksas la senlaborularon je 3—5 milionoj. La almoz-asocioj diras, ke ili ricevas rekordan nombron da petoj. La konservativa Amerika Federacio de Laboro raportas, ke 22 elcentoj el ĝiaj anoj ne havas laboron. Sed la ĵurnaloj preferas argumenti pri "prohibicio" (alkohol-malpermeso) k detale priskribi fondon (je 19. marto) de l' plej granda banko Ĉes *(Chase)*, kiu posedas monrimedojn de 2800 milionoj da dolaroj.

* * *

Enmigrantoj al Usono estu atentaj, ke ili ne havu inter siaj pakaĵoj la biblion, volumon de Ŝekspir aŭ la faman Deklaron pri Sendependeco. Se jes, la doganistoj konfiskos ilin, ĉar la Senato ĵus donis al ili la rajton per speciala leĝo. Jen la teksto pri neenporteblaj aferoj: "Nenia broŝuro, libro, skribaĵo, reklamilo, desegnaĵo, kiu enhavas instigon al ŝtatperfido, ribelo aŭ perforta kontraŭstaro al iu usona leĝo; aŭ kiu enhavas minacon kontraŭ iu persono usona, aŭ iu malpurega libro aŭ iu instrumento, drogo aŭ io por malhelpi naskiĝon." Por konvinki la aliajn senatanojn, Smut (Smoot), kiu estas mormono[1] el Utah, pruntedonis al ili la faman verkon de D. H. Lorens *(Lawrence)*, "Lady Chatterleys Lover" (La Amanto de moŝtino Ĉetele). Se ili povas vidi la malĉastajn reklamilojn en la usonaj ĵurnaloj, la sugestoplenajn priseksajn ŝercojn en la teatroj, ili miros plue.

* * *

En jaro 1929 estas eldonitaj 36 500 000 ekzempleroj de la biblio k 14 milionoj el ili venditaj en Usono. Kial? Ŝajne tie ĉi tradicio ankoraŭ regas; fanatikaj sektoj abundas; en la dimanĉ-lernejo ĉiu ano devas havi ekzempleron; speciala asocio (tielnomata Gideon-Asocio) provizas per ekzempleroj senpagaj ĉiun ĉambron en la vastaj hoteloj. Estas diferenco inter la plej vendata k plej legata libro.

* * *

Kuraĝon, vi senlaboruloj! D-o *D. D. Lescohier*, profesoro en ekonomio ĉe la Universitato de Vaŝingtono, ĵus eltrovis, ke senlaboreco povas esti plibonigo por industrio. Ĉar, li klarigas, per senlaboreco la nova industrio trovas provizon je laboristoj, kiuj

[1] Ano de religia sekto.

LA EVOLUO SEN DIO

(Daŭrigo. Vidu n-ojn 293/94.)

Ĉu la homo devenas de l' simio?

La ateistoj asertas kun Karlo Darvin, ke la homo devenas de l' simio.

"... La simiidoj (familio de simioj) dividiĝis tiam en du grandajn branĉojn, la simiojn de l' Nova k de l' Malnova mondo; de ĉi tiuj lastaj, en tre malproksima epoko, devenas la homo, la mirindaĵo k la gloro de l' universo" (Darvin, "Deveno de l' homo", ĉap. 6, lasta alineo).

Kiuj diras, ke Darvin neniam instruis, ke la homo devenas de l' simio, tiuj do mensogas.

"De la duon-simioj aŭ lemuroj, rekta linio, pasanta trans la pavianoj, kondukas al la homosimilaj simioj, k de tie al la homo" (Hekel — Haeckel).

Arturo Kit (Keith), aŭtoritatulo en la materio, devigis Moseon al silento de morto. "Ĉu Darvin estis prava dirante, ke la homo, sub la influo de mezureblaj k observeblaj biologiaj fortoj, estas suprenlevita de sia loko inter la homsimilaj simioj al tiu, kiun ĝi nun okupas? — La respondo estas *jes*" (1927).

"La patologio komparita, same kiel la eksperimentoj konkludantaj el la sang-analogioj, pruvis definitive la parencecon de l' homo kun la homsimilaj simioj k speciale kun la gorilo" *Encyclopedia Britannica* (Brita Enciklopedio), vol. 30, pĝ. 143, artikolo *Antropologio*, de G. Eliot Smit *(Smith)*.

"Oni interkonsentas sufiĉe bone por agnoski, ke la homsimilaj simioj k la homo devenas de komuna praulo k, siavice, ĉi tiu devenas de primitiva simio kun plata nazo" (Feris — Ferris, universitato Jel [Yale]).

"Kia ajn estu la organo pridiskutata, la diferenco inter la homo k la homsimilaj simioj estas pli malgranda ol la responda diferenco inter ĉi tiuj lastaj k la malsuperaj simioj" (Heksli). La diferenco estas unusole en la grado; similaj ekzistas inter la homaj estaĵoj. La gorilo k la ŝimpanzo estas niaj proksimaj parencoj" (Lel [Lull] universitato Jel).

La plej forta pruvo pri la simideveno de l' homo estas "la pruvo per la sango". Se oni intermiksas la sangon de du samfamiliaj animaloj — la hundo k la vulpo ekzemple — nenio malbona sekvas el tio. Sed se la sango de hundo estas miksata kun tiu de kuniklo, la du specoj de sangoĉeloj sin kontraŭbatalas ĝis morto. La homa sango venenas k malkonsistigas la sangon de l' malsuperaj simioj k de l' aliaj mambestoj, sed ĝi fluas pace en la vejnoj de l' grandaj simioj, kune kun ilia. La sango de l' homo k ilia prezentas la samajn kemiajn reagojn. Alivorte, la orangutango, la ŝimpanzo, gorilo ne nur similas nin per la strukturo, sed krome per la sango-konsistiĝo.

Ĉiu ateisto povas trudsilentigi kontraŭ-evoluiston proponante al li la sangprovon — la ateisto promesas lasi al si injekti sangon de granda simio en la vejnojn k lia kontraŭulo konsentu al injekto de sango de ia ajn animalo, kun la difino, ke la postvivonto gajnos en la afero. Neniu ortodoksa kristano akceptos similan inviton; li scias bone, ke la ateisto ĉeestus lian enterigon.

favore alilokiĝas. Ŝajne la kapitalista industrio tiel devus profiti mondskale.

* * *

"Ni fidu dion", kriis la eklezianoj en Novjorko la 16-an de marto, kiam ĉiuj religiaj sektoj laŭ peto de la papo preĝis kontraŭ la "persekuton" en Sovetio. Sed ankaŭ: "Havu vian pulvon ţute seka"; k ekster la preĝejoj staris policanoj. Ili havis revolverojn, larmgason (kiel uzitan en la milito) k eĉ maŝinpafilojn. Sed la ruĝul-sendiuloj ne atakis k starigis apartan kunvenon ĉeestatan de 12 mil personoj. Se Sovetio ankoraŭ povas pagi oron por la dinamomaŝinoj, la elektro-aparatoj ktp., kredeble la eklezianoj postulos bojkoton tute vane. *488.*

★

Diversaĵoj

Bestmortado en maro

Kelkaj latitudoj de l' afrika Okcident-bordo indikas grandan fiŝmortadon. Pli frue oni kulpigis pri tiu mistera okazo la submarajn tertremojn aŭ vulkanojn. La scienco biologia sciis klarigi tiajn fenomenojn, almenaŭ se ili aperas en pli aŭ malpli apartigitaj marzonoj, per sistema esploro en apartaj akvotavoloj. En tiaj akvopartoj, sur kies suproj regas vigla bestvivado, la multnombraj estaĵoj foruzas en la akvo la oksigenon tiom multe, ke en pli profundaj tavoloj ne restas plu sufiĉe da oksigeno por maldanĝerigi la akvosulfuron sur marfundo, kiu estiĝas kaŭze de malleviĝintaj best- k plantkadavroj. Tiel kolektiĝas putroŝlimo, kiu saturas la fundan akvon per venengasoj, en kiuj povas vivi nur kelkaj verm- k bakteri-specoj al tio kutimiĝintaj. Se fortaj ventoj, subitaj malnormalaj torentoj, eble ankaŭ tremado sur marfundo maltrankviligas tiajn akvojn, tiam disvastiĝas la veneniga akvosulfuro ĝis supraj tavoloj k mortigas tie la bestojn.

... kaj sur la tero

En tiu ĉi vintro Islando festas strangan jubileon: Pasis precize cent jaroj, de kiam ne plu ekzistas tie amfibioj k reptilioj. La regionoj norde de l' polusa cirklo estas tute same kiel altmontaro por si mem bestomalriĉaj. En Eŭropo, ekz., la polusan cirklon transpaŝas nur du reptili- k du ran-specoj. La montlacerto, krucvipero, herbrano, marĉrano. Rilate tion estas konsiderende, ke montlacerto k krucvipero naskas vivantajn idojn. Ovo-kovantaj reptilioj ne havas sufiĉe da varmo por kovi siajn ovojn, dum la vivanta ido en la akuŝonta ino sekvas sunbrilon; k tiel la besto bonvenigas sunvarmon por sia ankoraŭ nenaskita ido. La arktaj insuloj prezentas kondiĉojn malajn al tiuj en sama latitudo situitaj kontinentregionoj rilate al naskeblo por reptilioj k amfibioj. Nur Islando faris escepton, ĝis malnormala malvarmego de l' vintro 1829/30 detruis tie samtempe amfibiojn k reptiliojn. Tio estas pruvo por la fakto, ke en naturkatastrofoj tutaj bestrasoj estas ekstermataj.

Laŭ "Arbeiterzeitung" (Lab. gazeto) aŭstria *SAT-ano 7658.*

Korekto. En n-o 293, fruntpĝ., 1-a kol., lin. 12 de supre, bonvolu legi "Aristotelo" (anst. *Aristoto*), ĉar tio estas la ĝusta esp. formo por la nomo de l' greka saĝulo.

TAGO EL LA MILITO

Ŝajnas al mi esti nia sankta tasko k devo malfermi la okulojn al la posteuloj, atentigi ilin pri la tuta abundo da danĝeroj, turmentoj, suferoj k ĉikanoj, kiujn alportas la milito.


Dum mia militservo

Certe mi ne ĝoje aŭskultas aŭ legas tiajn militmemorojn, tute ne, sed necesas refreŝigi ilin, ĉar ĉie la figazetaro ree propagandas por nova milito k adoras k gloras la militheroaĵojn. Tio ja estas tre danĝera agitado ĉe la militema junularo.

El 950 tagoj, kiujn mi militpartoprenis, mi nur elektas la 23-an de oktobro 1914 — tago sama kiel ĉiuj antaŭe k poste, plena je malsatego, danĝeroj, turmentoj k ĉikanoj. Nia regimento kuŝis sur iu terpoma kampo sub la nuda ĉielo, atendante la plenumon de amasa mortkondamniĝo per la juĝisto MILITO. Antaŭtagmeze la regimento ricevis ordonon ataki la rusan fronton. Sed por ekkoni la forton k precize scii la situacion de la "malamiko", oni devas bone esplori pri tio antaŭ la atako. Do mi k du aliaj soldatoj estis destinitaj por plenumi tiun komision. Rampante sur la ventroj kiel vermoj ni alproksimiĝis la rusan defend-tranĉeon k plenumis nian taskon. Sed, ho ve! dum la rampado returnen unu K-do grave vundiĝis pro pafo en kolon k gambon[1], ĉar ia rusa piked-gardostaranto ekvidis nin k alarmis la soldataron. En tiu momento ni estis superŝutataj per kugloj, elsenditaj de la rusaj soldatoj. Mallonge ni interkonsiliĝis, k rezulte decidis savi lin spite la danĝero, en kiu ni troviĝis, ĉar lia vivo al ni ŝajnis esti same valora k sankta kiel nia. Sed malfacile estis alproksimiĝi al li, ĉar la loko, sur kiu li kuŝis, senmova k sveninta, estis ebena k celtrafebla. Tial ni devis uzi ŝirmilon, sed kian? Ni formis per la mantelo sablosakon k plenigis ĝin per sablo. Tiele ni sukcesis alproksimiĝi lin k savi lin, pene portante la grave vunditan kamaradon sur provizora portilo. Ni tre malfrue revenis al la regimento, k pro tio la kompaniestro fiinsultis nin k minacis akuzi nin ĉe la milittribunalo por ke ni estu punotaj, ĉar ni oferis nian vivon, por savi alies.

Krepuskis. Duoble ni estis provizitaj per municio (sed ne per manĝaĵo). Silentego regis ĉie. Ni jam sciis, kion tio signifas. La komandanto rimarkis, ke inter la soldatoj mankas la atakemo

[1] Gambo = femuro kruro.

La homo ankoraŭ ne komplete adaptiĝis al la marŝado sur la malsupraj membroj. La multnombraj rompiĝoj de l' pelv-ostoj, la oftaj kazoj de hernio k la malfaciloj, kiujn spertas infanoj por marŝi indikas, ke la vertikala sinteno estas freŝdata en la homa speco. La kurbaj piedfingroj de l' infanoj, ilia lerto ekpreni k grimpi, elmontras ilian simian prapatraron.

La fendlipoj, la palatoj sen volbo, la vost-alpendaĵoj estas postsignoj de praulaj bestotipoj. Ekzistas kazoj de virinoj posedantaj plurajn sinojn kun la mampintoj duope vicigitaj, kiel ĉe multnombraj malsuperaj bestoj.

Kiu kredos, ke la ĉino, la negro, la blankulo devenas de du judoj, kiuj vivis antaŭ 6000 jaroj? Estus necesaj almenaŭ 100 000 jaroj, por ke disvolviĝu la diferencoj, kiuj ilin disigas.

Ekzistas pli da similo inter normala homo k granda simio ol inter rusa leporhundo k pudelo. Ĉiu el tiuj ĉi paroj apartenas al la sama speco.

Se la homo estas kreita laŭ la bildo de dio, la samo valoras por la simio. Se vi pridubas tion, faru viziton al zoologia ĝardeno. Kial la ortodoksaj kristanoj ne ekatakas la zoologiajn ĝardenojn?

Tiu, kiu neas la parencecon de l' homo kun la bestoj, devus viziti la salonon de l' Homa Epoko, en naturhistoria muzeo (en Novjorko aŭ alie); li vidus per siaj propraj okuloj eldistingiĝi, laŭ ŝtupoj la fizikan pruvon pri tiu ĉi parenceco k tiu ĉi pruvo estas aliel decida k konvinka ol la infana rakonto biblia.

Darvin (Darwin) finas sian "Deveno de l' Homo" per tiuj ĉi paroloj: "La homo portas ankoraŭ en sia korpa formo la neforviŝeblan markon pri sia malsupera origino".

Komence estis la materio, kiu naskis la amebon, kiu naskis la vermon, kiu naskis la fiŝon, kiu naskis la amfibion, kiu naskis la reptilion, kiu naskis la mambeston malsuperan, kiu naskis la lemuron (katsimilan simion), kiu naskis la simion, kiu naskis la homon, kiu imagis dion. Jen la genealogio de l' homo.

(Daŭrigota.)

Karlo Smith.

El la franclingva gazeto "L'en dehors" tradukis N. B.

k entuziasmo, k li tuj eltrovis taŭgan atakemigilon k entuziasmigilon. Ĉi foje ne estis alkoholo, sed alia rimedo: li transdonis sekretan ordonon al sia oficirservisto, k post mallonga tempo unu soldato flustris al la alia: "Parizo estas konkerita de la germana armeo, tio signifas militfinon, donu pluen tiun ĉi komunikon". Tiu elpensita venko atingis sian celon, k vere kelkaj soldatoj entuziasmiĝis k infektis aliajn, k post mallonga tempo venis la ĉefordono: "Surmetu bajoneton".

Prepariĝo por ekatako. Mi ne povas priskribi la ekscitegiĝon, en kiu ni ĉiuj troviĝis en tiu momento. Subite la maltrankvilego k silentego angora estis interrompata de trumpeta signalo "Al ekatako antaŭen". Kriante, trakurante la mallumegan arbaron, nia atako subite ekhaltis pro densa pafado de la rusa fronto. Ne estis eble iri eĉ nur unu paŝon pluen antaŭen aŭ malantaŭen. Ĉiuj kuŝis sur la tero kiel testudoj, la kugloj densege pretersiblis ĉe la oreloj k ofte tuŝis la tornistron. Tiu ĉi infanteria pafado cetere estis eltenebla, sed subite la artilerio surverŝis nin per grenadoj dum kelkaj horoj. Imagu k konsideru, kio okazis dum tiu tempo. Tiu ĉi bildo tiom profundiĝis en mian animon, ke dum mia tuta vivo mi ne povos forgesi ĝin: la bruego de la krevantaj grenadoj k eksplodiloj estis intermiksita kun la ekĝemegado de la trafitaj k mortantaj soldatoj. La aspekto en la arbaro estis nedireble terura, kiam ĝi estis videbla okaze de krevantaj eksplodiloj, kiuj por momento helegigis la mallumon.

Ankaŭ mi estis vundata dufoje, sed mi nur sentis kompaton pri aliaj vunditoj, kiujn mi aŭdis sopirvoki al la fianĉino, aŭdis malbeni la tutan homaron; kiujn mi aŭdis preĝi al dio, ke li salutu la infanojn k la edzinon. Mi aŭdis plendi iun, kiu devis postlasi maljunan kadukan patrinon ktp.

Tio nur estas la duona vizaĝo de unu milittago: nun rakontu franca, angla, itala, rusa, usona k aliaj estintaj soldatoj. Iam ni kontraŭstaris unu la alian, stultigitaj, cerbmallumigitaj, okulvualitaj, kiel "malamikoj", sed hodiaŭ ni staras solidare kiel amikoj, kiel fratoj, k denove la ŝovinistoj k la tuta fiularo ludas per la alumetoj apud la pulvobarelo. Dum aliflanke oni povas konstati, ke la militviktimoj k militorfoj estas prizorgataj — honteginde k kompateginde . . .

SAT-ano 13 912, Wiener Neustadt.

DISKUTEJO

Pri moralo de l' vegetarismo

Ni ricevis pri tiu ĉi temo ankoraŭ plurajn artikolojn okaze de la antaŭirinta diskuto. Por eviti ripetojn k ŝpari lokon en "S-ulo", ni nur resume konigas la sugestojn de l' koncernaj K-doj. — Red.

K-do AMO (10 694) subtenas la vidpunkton de K-do Pargaĉevski (vidu n-on 283), opiniante, ke vegetarismo ne tuŝas moralan flankon, ke neuzado de l' bestaĵoj estas eĉ nemorala. Li diras plue, ke "forpreni la vivon de netaksebla nombro da vivrajtaj estaĵoj nur tial por ke ili ne mortu aŭ estu mortigitaj, estas romantika sonĝo por junaj knabinoj, sed ne pravigas la realon, ne enhavas veran amon, bazitan sur faktoj". Kaj: "La forpreno de la naskiĝeblo estas ekvivalenta al mortigo — aŭ pli barbara". Li diras, ke ni batalu por plibonigo de l' homaj k ankaŭ bestaj vivkondiĉoj, ĉar "preskaŭ ĉiu el ni preferus esti mortpafita post 10 jaroj ol tuj 'nature' morti pro mizero k doloroj".

K-do A. Mas (13 049), Hispanio, male opinias, ke nemortigo al bestoj estas konscienca afero. Se moralo ne estus grava faktoro en la afero, ne tiom da viandomanĝantaj personoj dirus, ke ili neniam manĝus viandon, se ili mem devus mortigi la bestojn. Estas granda hipokrito trompi la viktimojn, la pacemajn bestojn. Mortigi por vivi estas sendube morala, sed nemorala estas mortigi nenecese.

K-do 1896, Sovetio, diras, ke la vegetaranoj ne volas *hodiaŭ* plenumi neeblaĵon, sed ke ili volas starigi la problemon, kio necesas por ĝin solvi per kolektivaj fortoj *morgaŭ*.

K-do 14 361 opinias, ke la vegetarismo utilas nur al la ekspluatistoj, ĉar la vegetaranoj ne elspezas multe da mono vivante pli malkare, ne manĝante viandon; ke ekzistas kvazaŭa naturleĝo, laŭ kiu ĉiuj individuoj por ekzisti estas devigataj mortigi k manĝi unu la alian, ke ankaŭ bestbuĉado neniam estis nek estos peko.

K-do 13 059, Sovetio, esprimas sian tediĝon pri la sufer-melodioj por defendo de l' bestoj sur paĝoj de "S-ulo". Li rimarkigas, ke la milito inter homoj estas multe pli grava krimo, heredaĵo de kapitalisma sociordo, ke en nuntempaj vivrilatoj paroli pri forigo de ĉiuj maljustoj rilate al bestoj estas pli malpli naiva fantazio. Ke nuntempe en kapitalismaj kondiĉoj k estonte en socialismaj kondiĉoj intelekta mortigado kun racia celo ekzistas k ekzistos ĉiam.

Per tiu ĉi resumo ni finas la diskuton pri tiu temo.

Pri fanatiko

En renkontiĝo kun iu SAT-K-do (kompartiano), estiĝis vigla diskuto, kiu finiĝis per disputo, nur ĉar mi nature ne pensas same kiel li, ne pri partieco, sed pri la celoj de SAT. Interalie mi diris, ke SAT estas superpartia kultura organizo, ke por pure politikaj taskoj jam ekzistas multaj partioj, ke li legu la broŝurojn "La Laborista Esperantismo" k "For la neŭtralismon" de K-do Lanti. Li respondis: "Lanti ne estas komunisto, mi nenion legos de li skribitan."

Kion pensas la Ge-SAT-anoj pri tia fanatika spiritostato?

Alois Graller (7599).



Por nia meditado

Ekstrema obeemo pensigas pri nescio ĉe la obeanto; la samon oni povas diri pri la ordonanto: Li ja ne bezonas rezoni, sufiĉas, ke li volu.

Monteskjeŭ (France: Montesquieu, 1689—1755).

*

Iun tagon oni demandis al Solon, ĉu la leĝoj, kiujn li donis al la atenanoj, estas la plej bonaj. "Mi donis al ili, li respondis, la plej bonajn el tiuj, kiujn ili povas toleri." Bela parolo, kiu devus esti komprenata de ĉiuj leĝdonantoj. *Monteskjeŭ.*

*

Pluraj aferoj regas la homojn: la klimato, la religio, la leĝoj, la registaraj maksimoj, la ekzemploj de la pasintaĵoj, la moroj, la afektoj: el tio formiĝas ĝenerala spiritostato.

Monteskjeŭ.

*

La leĝoj havas tre grandan rilaton kun la maniero, laŭ kiu la diversaj popoloj havigas al si nutraĵojn. Necesas pli ampleksa kodo por popolo, kies ĉefa okupo estas la komerco k la marveturado ol por popolo, kiu kontentiĝas per kulturado al siaj bienoj. Necesas pli ampleksa por la ĵus priparolita ol por popolo, kiu vivas per siaj brutaroj. Necesas pli ampleksa por ĉi tiu lasta ol por popolo, kiu vivas el sia ĉasado. *Monteskjeŭ.*

*

Ne ekzistas laboro tiom pena, kiun oni ne povus akomodi al la forto de la laboranto, kondiĉe, ke estu la racio, ne la avaro, kiu reguligas ĝin. Oni povas per la oportuno de maŝinoj, kiujn la artfaremo elpensas aŭ aplikas, anstataŭi la devigitan laboron, kiun oni alie farigas de la sklavoj . . .

Mi ne scias, ĉu la cerbo aŭ la koro diktas al mi ĉi tiun artikolon. Eble ne ekzistas sur la tero klimato, kie oni ne povus trovi libervolajn laborantojn. Tial ke la leĝoj estis malbone faritaj, oni trovis mallaboremajn homojn; tial ke tiuj homoj estis mallaboremaj, oni sklavigis ilin. *Monteskjeŭ.*

Kolektis k tradukis *Herezulo.*

Menciu nepre esperanton ĉe represigo de artikoloj esp.-devenaj!

Esperanto-Servo

N-o 35 — 4-a jaro Gvidanto k kompilanto: O. BÄSSLER, Ebermayer-Str. 8, I, Leipzig C 1 (Germ.) 29. Majo 1930

EL FRANCIO

Nova elmontro de pacemo kapitalista

246 (Esp.-Servo.) Oni sentime povas diri, ke la franca nord-departemento estas kvazaŭ la kerno de la franca industrio. Kaj en tiu departemento mem la teks-industrio estas la ĉefa: en la famaj urboj Roubaix-Tourcoing laboras miloj da geteksistoj. La teksmastroj de tiu regiono apartenas al la klaso de t. n. "Grand-Kapitalistaro". Ili celas plivastigi sian ekonomian superecon je *politika* k *socia* superecoj. Tion celante, ili unuiĝis en "Mastra Teks-Sindikato", k inter si planis ĝeneralan subpremon kontraŭ la laboristoj. Ili starigis "Intermastran Union", kies ĉefaj programpunktoj estas: 1. por gardi la teks-mastrojn kontraŭ ribelemo de klaskonsciaj laboristoj, la anoj de la Intermastra Unio promesas regule transdoni al la Centro la nomojn k adresojn de laboristoj forigitaj el teksejo pro sia klaskonscio; 2. la anoj transdonos depone al la Centro de l' Intermastra Unio sumon de 10 000 frankoj, k se iu el la anoj dungos laboriston forigitan de alia teksejo, tiu sumo estos konfiskita. La laborista gazetaro tre atentas tiun fakton. Ekz. skribis unu el ili: "estas vera krimo kontraŭ la proletaro, k nepre la registaro devas elmontri sian opinion. *F. Chamarre, La Rochelle.*

EL HUNGARIO

Raciigo — Striko — Senlaboreco

247 (Esp.-Servo.) La "raciigo" en la industrio estas finita. Rezulto: kelkmil pliaj senlaboruloj k profito por kapitalistoj. Ja la "raciigon" faris kapitalistoj, laŭ kies opinio ĝia celo estas: malaltigi la produkt-kostojn per malaltigo de salajroj k postulo de plia produktado. Multaj fabrikoj estas ĉesigataj; ekz. en fabriko "Ganz Danobius" laboras nur ¼ el inter la antaŭ 1 jaro laborantoj. Dume oficistoj, majstroj k direktoroj eĉ pli-multiĝas — ili ja konsistigas la "naci-subtenan" klason. Dume ankaŭ la terkulturon enpenetras pli k pli da maŝinoj k senigas dekmilojn de laboro. Terkulturisto salajras 1.20—2.00 pengojn (unu kilogramo da pano kostas 0.40 pengojn).

"Raciigi sen mono" estis la devizo de la kapitalistoj. Kaj tial estis intencite, en fabrikon "Ganz Danobius" enkonduki t. n. Bedaux (Bedo)-sistemon. Imagu nur, ĝi ne ekspluatas maŝinojn sed nur homan forton. Estas fiksita certa kvanto kiun laboristo devas produkti, aliokaze li estas maldungita. Tiu kvanto estas tiom multa, ke laboristo bezonas almenaŭ kvinjaran sperton por fari ĝin. Ĝia celo estas, plej rigore ekspluati laborforton. Krome oni volis malaltigi salajrojn. Niaj sendependaj ĵurnaloj tuj kriis pri neklereco de la laboristaro, kiu kontraŭstaras raciigon simile al "Luddismo". Sed vanaj estis ĉiuj klopodoj. Malgraŭ nia malbonega situacio tuj la laboristoj ekstrikis. Pli ol mil laboristoj iris surstraten. Nun, post naŭsemajna batalo, finiĝis la striko sukcese. Dum la striko policanoj gardis la fabrikon k akompanis la strikrompantojn, kiuj ne el inter la strikantoj rekrutiĝis. Sed post kelkaj tagoj ĉiuj strikrompantoj estis forigitaj k rezistemo, batalemo alportis la rezulton.

La fakto, ke senlaboreco ĉiam kreskas — senlaboruloj de neniu ricevas ajnan subtenon, nek de ŝtato nek de urbo — k ke nenia signo estas por pliboniĝo de la situacio, ekmovigis la senlaborulojn. Kelkmil senlaboruloj postulis antaŭ la parlamento: laboron, panon. Respondo estis, ke kvindekses personoj estis punitaj je tridekkvin pengoj! La polico ricevis la ordonon, ke ĉiun ekmoviĝon ĝi devas tuj silentigi. Kaj la polico ja volas meriti sian salajron. Tamen malgraŭ ĉiu perforto ĉie en la lando okazis spontanaj manifestacioj, dum kiuj ne nur unufoje laboristoj petis pro enkarcerigo motivigante, ke almenaŭ dume ili havos panon. Kaj la "ministro por popol-bonstato" (pastro) je ordono de kapitalistoj diris, ke senlaborula helpo estas nun neefektivigebla. Dume la registaro donacas centmilojn da pengoj al kapitalistoj el la poŝoj de l' laboristoj.

Ni nur silente povis festi unuan de majo, sed tamen estis aŭdebla forta krio: for Horthy-Bethlen-reĝimon! *2828.*

EL GERMANIO

20 milionoj da "kanajloj" tromultaj

248 (Esp.-Servo.) Kelkaj "konstatoj" de la justic-ministro Bredt pri la viktimoj de la kapitalismo, pri senlaboruloj k la revolucia laboristaro: "Antaŭ ol konsentus tiuj sinjoroj (kapitalistoj) plenumi postulon de la laboristoj: sama salajro por ĉiuj, ili pli volonte fluigas sangon, ankaŭ se kelkaj milionoj el t. n. kanajloj (revoluciaj laboristoj) mortos... Mi jam antaŭ jaroj diris: se dum unu nokto subite 20 000 000 germanoj mortus, nia popolo estus la plej riĉa de la mondo!" Antaŭ ol liaj deziroj efektiviĝos, la proletoj ekprenos pafilojn mem k direktos ilin kontraŭ la malamikoj de l' proletaro, ankaŭ kontraŭ la fihomo Bredt... *10 596, Nieder-Salzbrunn.*

EL SOVETIO

Nomadoj kolektiviĝas

249 (Esp.-Servo.) En Mezvolgio kolektivizo de kampar-mastrumo estas grandskala: kolektiviĝas ĉio k ĉie. Ne postrestis eĉ... ciganoj. Dum marto laŭ iniciato de unu progresema cigano estis organizita kolektiva mastrumejo nure el ciganaj familioj (ĝis tiam vagintaj). La ŝtato certe ĉiel ilin helpas: ĝi donis bonan teraĵon, laborbruton, ilojn ktp. Laŭ inklino de la mastroj ĉi tiu "Kolĥoz" estos precipe brut- k ĉevalbreda, tial la ŝtato donis al ĝi bonrasajn ĉevalojn, porkojn k. s. Dume en la mastrumo estas nur kelkdekoj da familioj, sed ĝis aŭtuno la kvanto multe kreskos, ĉar jam anoncis sian deziron aliĝi ĉ. cent familioj. Tiele ideoj de kolektivismo encerbiĝas al ĉiuj popoloj de USSR. *12 115, Samara.*

El Argentino en USSR-on

250 (Esp.-Servo.) La red. de Kieva pola gazeto "Serp" (Rikoltilo) ricevis el Argentino kolektivan leteron de granda grupo de laboristoj-poloj, kiuj dum carismo elmigris el Ukrainio Argentinon. Elmigrintoj-poloj informas, ke ili kreis agrikulturan komunumon k volas retroveni Ukrainion. Ili petas la red. helpi ilin por ricevi reir-vizon en USSR-on. *14 543, Bobrov.*

Eklezio kaŝis siajn trezorojn

251 (Esp.-Servo.) Dum tra-fosado de ĝardeno (en urbo Simferopolo, Krimeo) apud eksa ĉefepiskopa domo (nun la somera placeto ĉe klubo de agrikulturaj k arbaraj laboristoj) laboristoj trovis "kaŝ-trezoron" — enfositajn en grundo ekleziajn trezorojn. Oni trovis ĉ. 45 arĝent-krucifiksojn, tasegojn por di-servo, bonodor-fumilojn ktp. *14 543, Bobrov.*

"Angarstroj"

252 (Esp.-Servo.) Apud urbo Irkutsk (Siberio) ĉe rivero Angara, estas projektata konstruado de elektrostacio plej granda en Tutmondo. La stacio laboros per tre malkara akvofalenergio. Potenco de "Angarstroj" (tiel oni nomas la stacion) estos 3 200 000 kiloŭatoj; ĝia potenco estos kvinobla kompare kun nunkonstruata "Dneprostroj". La konstruado de tiu elektrostacio ludos grandegan rolon en industria progreso de Irkutska distrikto, ĉar sur la tre malkara bazo energio de "Angarstroj" funkciados multaj grandegaj fabrikoj, konstruotaj laŭ plano de industriigado. Tiamaniere Irkutska distrikto havas gravan estonton en sovetia ekonomipotenco. *B. Rudkeviĉ, Irkutsk.*

Kio okazas en Ĉinio, Japanio, Hindio, Aŭstralio, Afriko...?

SENNACIULA VIRINA PAĜO

Sub la kontrolo de Virina Sekcio de SAT. — Red. Adreso: Elma Adamson, Box 73, Göteborg, Svedio.

KION LEGAS NIAJ INFANOJ?

Jam en aĝo de ok jaroj la nederlandaj infanoj ricevas legolibrojn, ĉiusemajne pruntedonatajn de la lernejoj. Ili estas celitaj kiel amuzaj, sed ankaŭ kiel instruaj k klerigaj libroj. Kion niaj infanoj lernas el ili?

La plej multaj el tiuj libroj estas tielnomataj "historiaj" libroj. Ili enhavas plej multe la okazintaĵojn de militoj inter la diversaj nacioj k la heroajn agojn de la patriotoj dum tiuj militoj. La infanoj legantaj lernas tiel malami la kontraŭbatalantojn, la fihomojn, kiuj volas subpremi k mortigi la kompatindajn nekulpulojn, la heroan proprapatrian popolon. Kaj ili bone lernas, ke ĉiuj homoj estas fihomoj, escepte tiuj de la propra lando. Tiel jam la malgranda infano estas edukata kiel bona patrioto, por kiu la amo al la patrio k la regnestro regas super ĉio.

Sed ne sole ili ricevas historiajn librojn. La fabeloj ankaŭ estas bazitaj sur malnova sociordo. Ĉiam la bonaj malriĉaj laboristoj ricevas monon de la reĝo aŭ la juna laboristknabino edziĝas kun la princo. Ĉiam la riĉo estas la idealo en tiuj libroj.

Kion do lernas niaj infanoj el tiuj ĉi libroj?

Amon al la riĉo, sopiron al belaj vestoj k mono, k malamon al alilandaj homoj.

Ĉu do ne ekzistas bonaj infanlibroj? Nu, en la nederlanda literaturo oni devas serĉi ilin per lanterno. Kaj certe ili ne estas en la lernejaj librarejoj.

Tial mi treege ĝojis, kiam estis eldonitaj kelkaj esperantaj infanlibroj. Eble tiuj estus pli bonaj por la infanoj. Ĝojante tial mi eklegis la libreton "Kion rakontas la amikoj de Peĉjo[1]". Kaj kvankam ĝi pli bonas ol la plej multaj el la infanlibroj, ĝi ne tute plaĉis al mi. Ĝi estas tro mizera por la tre impresema infananimo. Kaj ankaŭ la malamo al la riĉuloj por junaj infanoj ne bonas, ĉar ili ne povas kompreni ĝin. Klaskonsciaj ili devas iĝi pro amo al justo, pro amo al ĉio, kio vivas k pro la justa sento pri vivrajto de ĉio.

Pli malbona ol tiu ĉi libro estas laŭ mi la libreto "Diablidoj[2]". Ĉu ni nenion pli bone povas instrui al niaj infanoj ol malamon? La infananimo tre bezonas la lumon, la amon. Kaj ĝi serĉas ĝin ĉie, kie ĝi estas trovebla. La laborista infano jam tro multe devas sopiri al belo k lumo, ĉar ofte la hejma vivo estas mizera. Por tiuj infanoj libroj multfoje estas ilia konsolo. Sed la kapitalistaj libroj neniam enhavas la veran vivoĝojon.

Ĉu ni laboristoj do rajtas ankaŭ nur doni malamon al ili?

Ni ĉiuj esperas, ke niaj infanoj iĝos bonaj batalantoj por la nova mondo. Tial multaj el ni diras, ke ni donu al ili klaskonsciajn librojn. Jam kiel junaj infanoj ili devas scii pri klasdiferencoj k klasbatalo. Kiam mi nur diras k instruas, ke ili devas esti revoluciemaj, tiam ili ankaŭ iĝos.

Sed tiuj forgesas, ke ni por nia batalo ne bezonas ŝafidojn, kiuj ĉiam faras tion, kion diras iliaj gvidantoj, sed ke ni bezonas pensantajn homojn, kiuj konscie scias, kial ili estas revoluciuloj, k ne iĝas tiaj, ĉar la patro ankaŭ estas. Sekve, ni ankaŭ ne surmetu al ili moralon, sed pensigu ilin nedepende.

La patrinoj, sur kies ŝultroj kuŝas granda parto de la infanedukado, povas multe fari por tio. Ne silentigu la infanon, kiam ĝi demandas iom tro multe, sed respondu al ĝi laŭ vero k klopodu komprenigi al ĝi per facilaj ekzemploj, kial la nuna sociordo ne taŭgas. Sed ne instruu al ĝi, ke ĉiuj kapitalistoj estas fihomoj k ĉiuj laboristoj bonaj. Ankaŭ ne malpermesu al ĝi ion, ne klarigante la kialon. Ne malpermesu al ĝi legi librojn, sed zorgu, ke ĝi legu ilin k la gepatroj priparolu tion kun ĝi k aldonu, kial ili ne trovas la enhavon bona.

Virinoj, ni kiuj jam de la unua tago edukas nian infanon, ĉu ni ne povos eduki ĝin nur kun la amo al la vivo, al ĉio vivanta k forigi la malamon el ĝia vivo? Kiam ni nur donos al ĝi la veran viv- k homamon, tiam nia infano iĝos batalanto, ĉar homo, kiu nur konas juston k amon por la homaro, devas esti revoluciulo en nuna sociordo. *Lies van Trotsenburg (12 720).*

[1] SAT-eldono: Prezo 0.60 mk. g.
[2] Same: Prezo 0.60 mk. g.

EKVEKIĜU, VIRINOJ!

Mi ofte miras, kial tiel malmultaj virinoj fariĝas esperantistoj. Ekzemple, ĉe nia 9-a Kongreso, mi rimarkis, ke ĉ. 70% el la partoprenantoj estas viroj, k ĉ. 30% virinoj. Ĉu mi eraras? Ankaŭ ĉe la kunsidoj ĉiuj parolantoj estis viroj. Kial? Ĉu mankas al ni cerbo? Aŭ ĉu ni estas tro mallaboremaj, tro lacaj? Tion mi ne kredas. Reveninte de nia 9-a, mi iris al Parizo, kie mi restis dum du semajnoj. Tie mi dufoje vizitis (ho honto!) la burĝan esp-istan rondon, la "Verda Kato". Ĉeestis iuj junuloj k kelkaj geedzoj, sed, inter la geedzoj, nur la edzoj estis esp-istoj. La tutan tempon la virinoj (pardonu — sinjorinoj) babiladis franclingve. La duan merkredon okazis debato pri la kuniĝo inter germanoj k francoj. Unu el la debatantoj petis la anglan sinjorinon (ne K-dinon), ĉu ŝi bonvolas ankaŭ partopreni la debaton. Mi tuj ekstariĝis k komencis: "Karaj Gekam . . . ho, pardonu! Gesinjoroj . . ." Jes, mi tutkore partoprenis la debaton, se nur por elmontri, ke ne nur francoj k germanoj bezonas kuniĝi sed ĉiulandanoj; plie por pruvi, ke virinoj ankaŭ kapablas debati k oratori same kiel viroj.

En la jaro 1918 la anglaj virinoj ekrajtis voĉdoni post la aĝo de 30 jaroj, sed nuntempe tiu leĝo eĉ pliboniĝis, ĉar ni rajtas voĉdoni je la aĝo de 21 jaroj, same kiel la viroj. Nu, K-dinoj, ne multe utilas rajti voĉdoni, se oni ne scias, kiel uzi la rajton; do anglinoj edukas sin politike k aliel, k preskaŭ ĉiuj publikaj kunvenoj konsistas el 50% da virinoj, kiuj komprenas k interesiĝas.

Virinoj, ekvekiĝu! Lernu esperanton, lernu politikon ktp. k ne diru: "Mi ne havas la tempon". Ĉar oni povas fari tion, kion oni volas.

M. Sampson (14 374).

P. Kropotkin
ETIKO
VOLUMO DE 240 PAĜOJ
Prezo: 1,80 mk. g.
Entenas la altvalorajn moralsciencajn konsiderojn de la granda anarkista pensulo. Verko de ĉiama valoro.
Havebla ĉe Administrejo de SAT.

Virinoj en la kooperativa movado

La kortbirdo-farmistoj de Saskaĉevan (Kanado) raportas, ke 4 el iliaj gvidantoj estas virinoj. Tiuj de Alberta same havas 4 virinajn gvidantojn k ankaŭ la farmista unuiĝo de Ontario. La Unuiĝo de farmlaboristinoj en Kanado interesiĝas pri leĝaj proponoj, kiuj gravas por virinoj. En Manitoba la farmvirina unuiĝo (W. F. W.) starigis komitatojn por studi leĝ-aferojn, publikan sanon, edukadon k elmigradon. En Germanio unuiĝoj de hejmmastrumantinoj sukcesis starigi kooperativajn societojn.

Laŭ koop. Gaz. "Wheatsheaf" (Tritikgarbo) M. Sampson.

Virina saluto el Sovetio

Triumfa kunsido en vilaĝo *Kotli*, Leningrada distrikto, okazinta je 8-a de marto, salutas laborulajn virinojn en kapitalistaj landoj okaze de Internacia Virina Tago k aldonas, ke ni estas solidaraj kun vi.

Laŭ komisio: Caetkova Valentino.

TRA ESPERANTIO

ĈU VERE ESPERANTO PROGRESAS?

Vere laŭdinda estas la emo de nia SAT-anaro partopreni diskutojn sur la paĝoj de "S-ulo", ĉar tio krom pli alproksimigi unu la aliajn, plifaciligas konatiĝon inter SAT-membroj. Plie, tiel tendencas formiĝi en niaj vicoj vera sennacieca spiritostato, pro tio ke la variaj temoj estas ekzamenataj de homoj loĝantaj en malsamaj flankoj el la mondo, kies edukado k vivdisvolviĝo tute malsimilas inter si. Fine mi pensas, ke multaj K-doj, kiuj neniel ion skribus por "S-ulo", decidiĝos per tiu vojo diskonigi sian pensmanieron.

Hodiaŭ mi prezentas al "S-ula" legantaro temon, — laŭ mia opinio interesan. Mi esperas, ke la K-doj eldiros sian vidpunkton, malgraŭ ke miaopinie la temo ne devas esti nomata diskuta, sed nur prezentas kamaradan interbabiladon.

Legante eŭropajn esp. gazetojn oni tuj akiras la konvinkon, ke niaj transmaraj K-doj ĉiam rilatas al esp-o kiel afero tute ekradikiĝanta k kies definitiva altrudo estas nur afero da pli malpli da tempo. Neniam oni aŭdas alian kontraŭan opinion, sed tamen, kvankam mi mem ne dubas pri tiu finrezulto, ni devas forpuŝi tiajn optimistajn kredojn, k iom pli severe trastudi nian trakuritan, -atan k -otan vojon. Nedubeble tiu nia sinteno rilate la propagandon de nia lingvo treege helpos nian movadon.

Mi parolu unue pri la lando, kie mi loĝas, ĉar kompreneble ĝi estas al mi plej bone konata; de l' ĉi tiea esp. movado mi volas fari konkludojn, aplikeblajn al aliaj landoj, kies situacio egalas tiun de Argentino.

Troviĝas ĉe ni 25 SAT-anoj, sed el ili ni povas kalkuli kiel enlandanojn nur 5, aliaj estas fremduloj. SAT-anoj en ceteraj latin-amerikaj ŝtatoj nombras multe malpli, sume ili estas 10, ni supozu, ke ili ĉiuj naskiĝis en la surloĝataj landoj: rezultas timiga nombro da latin-amerikaj SAT-anoj: nome 15.

Ni ankoraŭ ekzamenu la situacion en Usono k Kanado, la rezulto por ambaŭ landoj estas sume 88 SAT-anoj. Sed ni esperas ne esti tro postulemaj, se ni duonigas tiun nombron, ĉar laŭscie al Usono fluas konstante grandega amaso da enmigrantoj k prave ni supozas inter ili ankaŭ espistojn.

Mi nek povas, nek opinias necesa prezenti al la legantoj de "S-ulo" absolutajn ciferojn, sed laŭ mia opinio sur bazo de la sperto en Argentino la nombro de amerikaj SAT-anoj en nordo, centro k sudo de l' kontinento ne superas 59. Tiu nombro estas vere ridinda: pli ol 200 milionojn da loĝantoj enhavas Ameriko, k rilate al civilizo, kulturo, k ekonomia vivo de amerikaj popoloj, malgraŭ esceptregionoj — oni sendube povas kompari ilin al eŭropaj landoj.

Sed la amerikanoj ne estas la solaj, kiuj sin montras apatiaj al esp-o, en aliaj kontinentoj ni konstatos, ke ties loĝantoj egalas, eĉ superas nin. Ni kalkulu 24 SAT-anojn por Afriko, kvankam simpla rigardo de l' nomoj k postnomoj de alĝeriaj K-doj (v. en Jarl.) instruas, ke multaj el ili ne estas indiĝenoj. En Aŭstralazio estas 14 SAT-anoj, k en Azio 79, do sume:

Ameriko	59
Afriko	24
Aŭstralazio	14
Azio	79
	176

Jen la nombro, certe trograndigita, de ekstereŭropanoj en nia Asocio.

SAT prave plendas pro manko de membroj, kiom da ili, el tiuj landoj, povus eniri nian tendaron, se esp-o estus tie pli diskonigita? Ja diferenco inter eŭropaj SAT-anoj 6153 kontraŭ 176 ekstereŭropanoj estas tute ne komprenebla.

Oni povas pensi, ke tiu fenomeno trafas speciale nian Asocion, sed tute ne, kalkulo de UEA-delegitoj (membroj ne estas en ĝia jarlibro) k ankaŭ komparo inter eŭropaj k ekstereŭropaj gazetoj sufiĉos por doni al ni klaran bildon, ke tiu "malsano" trafas la tutan esp. familion.

Sendube kelkaj K-doj rimarkos, ke mi forgesis enkalkuli sovet-aziajn SAT-anojn, sed pro teritoria kontinuo, k tial ke ĝi estas regata per samaj leĝoj, oni povas konsideri tiun regionon — de esp. vidpunkto — kiel eŭropan. Sed, kiel dirite, mi ne celis starigi rigoran statistikon, sed nur evidentigi malprogresan staton de esp. movado ekster Eŭropo.

Ĉu la sukcesa kreskanta disvastiĝo de esp-o en Eŭropo finfine altrudos ĝin en ne-eŭropaj regionoj? Aŭ ĉu indiferento de ne-eŭropaj popoloj rilate al esp-o, speguliĝos en Eŭropo malutilante aŭ ĉesigante la sukcesan disvastiĝon de l' lingvo? Certe la afero fariĝas komplika, k mi mem opinias, ke mia dua demando alproksimiĝos al realo, se tiu vere katastrofa situacio ne solviĝos favore al nia movado, dum eŭropaj SAT-anoj elpruvos kreskantajn malfacilojn por interrilati kun ne-eŭropanoj. Korespondgrupoj, Labeskaj rondoj, Interligaj servoj fatale maltrafos siajn celojn pro manko de eĥo al siaj penadoj. Kaj se tiu situacio ankoraŭ plifirmiĝos, t. e. daŭre kreskados malproporcie la nombro da espistoj, certe alvenos epoko, kiam ja prave esp-o estos prefere rigardata kiel eŭropa interŝtata helpa lingvo. Ĉu mirinde, ke multaj K-doj hezitas ellerni ĝin, konstatante ĝian mizeran prosperadon ekster eŭropaj landoj?

Esp-o estas ja universala entrepreno; do, ni nur parolu pri ĝia sukceso, kiam ĝi progresos proporcie en la kvin partoj de la mondo.

Nune tiu malekvilibro kaŭzas al la SAT-movado malagrablajn okazojn: Eŭropaj SAT-anoj plendas, tial ke ili ne povas interkorespondadi, k ni ĉi tie suferas veran ondegon da petoj, demandoj, eĉ postuloj, kiuj metas nin ĉiumomente en konflikton, ĉu ĉiujn atenti — kio malgraŭ plej granda bonvolo neeblas —, aŭ ĉiujn forĵeti. Tio kaŭzas, ke ĉi tieaj SAT-anoj ne akceptus eĉ senpage aperigon de anonco pri korespondado: unu el niaj K-doj pro anonco en "S-ulo" ricevis pli ol 200 P. K., kio signifas, ke li estis devigata elspezi por respondi pli ol 30 argentinajn pesojn — 12 dolarojn.

La SAT-aparato lamas, same kiel ĉiu alia esp. organizo. Ni ofte fanfaronas ke per esp-o ni povas interligi diverslingvajn prolet-organizojn, sed bedaŭrinde en multaj landoj tute forestas SAT-anoj, kaj en multaj aliaj ankoraŭ dubinde ili plenumus kontentige koncernajn taskojn, se efektive stariĝus serioza interŝanĝo inter diversnaciaj proletaj organizoj.

Kiel solvi tiun problemon?

Ni evitu blufi. Ni ĉiuj bone scias, ke iu K-do post sufiĉa agitado sukcesas malfermi esp. kurson, ne malofte partoprenatan eĉ de 60 lernantoj; sed ni ankaŭ bone konas la fakton, ke post ses monatoj el ili restos nur 20, k eble post unu jaro, du aŭ tri, kiuj post nelonge ĉion forlasos (ekster eŭropa vidpunkto). Ne entuziasmigu nin pro tio, ke ia ĵurnalo aperigas favoran artikolon pri esp-o: tiuj same plenigas siajn paĝojn per unu tia artikolo, aŭ per detala historia priskribo de fama krimulo.

Ni starigu ankoraŭ alian demandon: Kial esp-o ne progresas ekster Eŭropo?

— Ne temas pri eltrovo de ia ajn formulo, kies alpreno, kvazaŭ sorĉe, sukcesigos nian movadon, sed pri serioza k konscia studado de l' afero fare de l' SAT-anaro, ĉefe de tiuj, kiuj troviĝas en malprosperaj regionoj. Ni ankaŭ parolu pri niaj malvenkoj — pli instruaj ol venkoj — klare k senhonte!

Prave oni diras, ke starigi problemon ja estas eksolvi ĝin.

A. Barrot, Buenos Aires.

PRI PLENA VORTARO DE ESPERANTO

Kiam ni iniciatis la eldonon de ampleksa vortaro esperanto-esperanta, ni sendube konsciis pri multaj malfaciloj en la plenumado de tia eksterordinara tasko, por kiu ni bezonis ĉiujn materiajn k spiritajn fortojn. Tamen ni, k same la por tiu laboro varbitaj aŭtoroj, membro de la Esperantista Akademio, la direktoro de l' Sekcio: Komuna Vortaro k 3 Lingvokomitatanoj, subtaksis tiujn diversflankajn malfacilojn. Tial la verko ne povis aperi, kiel esperite, t. e. je la dato fiksita.

Ni scias, ke multaj K-doj, kiuj mendis k antaŭpagis la volumon, malkontentas k grumblas. Ni bone komprenas ilian malkontenton k malpaciencon. Ni tamen petas ilin ĉiujn, kiuj havas faktan kaŭzon por malkontenti, ke ili pacienciĝu ankoraŭ mallongan tempon, en la konscio, ke ilia antaŭmendo estis valora kunhelpo por ebligi la eldonon de tiu granda verko ĉe SAT. Ni povas informi nun, ke la presisto havas en manoj la tutan manuskripton (krom la antaŭparolo) k ke 4 5 0 p a ĝ o j jam estas presitaj.

Ni antaŭkalkulis 450 paĝojn por la tuta volumo: nu, ĝi estos p l i o l 5 0 0 - p a ĝ a! Do la personoj, kiuj antaŭpagis laŭ relative tre malalta prezo, ne havos finfine motivon por bedaŭri. Ilia iom longa atendado estos bone kompensata.

Pri la nova prezo fiksota por tiuj, kiuj mendos la volumon post apero (nuntempe ja mendoj je favora tarifo ne plu estas akceptataj) ni sciigos post nelonge en "S-ulo" k per novaj specimenaj folioj, kiuj estas sendotaj senpage al la interesiĝantoj.

Direkcio de SAT
23, rue Boyer, Paris XX.

K-doj gazetpriservantoj!

La sperto montris, ke ofte gazetoj estas pretaj enpresigi raporton pri gravaj okazoj en nia movado, precipe pri la kongresoj de SAT, se ili *ĝustatempe* ricevas tiun materialon. Por ke en tiu okazo ne ekestu malfunkciado ĉe nia venonta kongreso, ni invitas ĉiujn K-dojn, kiuj estas pretaj provizi gazeto(j)n sialoka(j)n per kongresraporto en kiel eble plej konvena tempo, ke ili, ne tro malfrue, sendu sian adreson al la Organiza Kongreskomitato (adr: K-do *J. Sulsky,* 19 Leyton Rd., *Harpenden,* Anglio). Ĉi tiu kun la kongresestraro zorgos pri tio, ke la teksto de l' raporto tuj post la kongreso estu ekspedata al ili. Tasko de l' Gek-doj sekve estos nur, traduki nacilingven k ekspedi kiel eble plej rapide al la redakcio de l' priservata gazeto la raporton.

Ni esperas, ke en ĉiu loko, kie aperas laborista gazeto, troviĝos laborema K-do, kiu atentos ĉi tiun alvokon.

Direkcio.

SAT-edukistoj, venu al la Londona Kongreso k raportu pri klastendencoj en la edukado vialanda!

La Laborista Instruista Ligo (T.L.L.) — angla sekcio de Edukintern — organizos publikan kunvenon dum la Londona SAT-Kongreso por diskuti la klasan celon de edukado en kapitalistaj landoj k en Sovetio. Venu multnombre k helpu sukcesigi tiun gravan entreprenon!

Mi deziras ricevi multajn skribajn raportojn el div. landoj. Raporto pri ĉiu lando estos maŝinskribita k disdonata ĉe la kunveno. La plej grava materialo estos uzata en paroladoj de K-doj diverslandaj kiuj estos tradukataj anglen. Ankaŭ ĝenerala diskuto okazos.

La lasta dato por ricevo de l' skribitaj raportoj estas: *30-a de junio.* Sendu nepre ĝustatempe al: K-dino *C. Osmond,* 95 Fowlers Walk, Ealing, *London W. 5.*

Ni sendas sugestojn pri parolindaj temoj (sed tre volonte ricevos ankaŭ raportojn alimaniere traktatajn).

P r i k l a s p a r t i e c o e n e d u k a d o

1. La edukada sistemo de via lando montranta
   a) la manieron, laŭ kiu kapitalismo kontrolas ĉiun edukan ŝtupon;
   b) la klasdiferencon inter div. tipoj de lernejoj k geinstruistoj.
2. La kapitalisma spirito en la lernejo:
   a) Disciplino;
   b) Organizado k metodoj de instruado.
3. Rilatoj kun religio:
   a) Kvanto da eklezia kontrolo;
   b) Religiaj demandaroj por instruistoj;
   c) Religio en la lernejo.
4. Partieco en lernolibroj k instruado ĝenerale
   a) Historiaj lernolibroj — Analizo de 1. ĝen. vidpunkto, 2. relativa spaco k gravo de militoj k industria historio, 3. titoloj k karakterizo de la plej popularaj.
   b) Kantoj k literaturo;
   c) Partieco en aliaj temoj.
5. Organizoj ligitaj kun la lernejoj:
   1. de lernantoj, ekz. militemaj organizoj kiel knabo-skoltoj, oficirdresadaj ĉeloj (O.T.C.) ktp.
   2. por la lernantoj, ekz. postlernejaj zorgkomitatoj.
6. Malpermesoj al geinstruistoj — eksigoj pro politikaj opinioj, "nigra listo", ktp.

9896.

Suplemento al la adresaro en Jarlibro

(Tiu ĉi nomaro ne estas por korespondemuloj)

(Dua parto. 9-a daŭrigo. Vidu n-on 284/92)

Köln (Germanio)
16181 *Dülken W.*, Buchforststr. 40, Kalk, seruristo.
16289 *Müller, P.*, Rixdorfer Str. 78, Mülheim, seruristo.
Komotau (Ĉeĥoslovakio)
16176 *Otto Josef*, Weinberggasse 74, ministo.
Kopenhago (Danio)
16343 *Petersen G.*, Rekrut 59, 2.Komp. Ingeniörkasernen.
Koskolovo (Sovetio)
4608 *Golubcov J. R.*, Leningr. okr. der. Miŝino.
Krasnodar (Sovetio)
16157 *Klapcov Teodoro*, Krepostnaja 28.
16156 *Novikov Bazilo*, Novaja 75, metalisto.
Kremenĉug (Sovetio)
16109 *Asnin Vl.*, Pedteknikumo, studento.
16024 *Avramenko Fedoto*, Pedteknikumo, studento.
16043 **Begma Nastja*, Pedteknikumo, studentino.
16028 *Beliĉenko Luka*, Pedteknikumo, studento.
16111 *Bilaŝ Sergeo*, Pedteknikumo, studento.
16036 **Bordjug Mikolo*, Pedteknikumo, studentino.
16041 *Burlaka Pilipo*, Pedteknikumo, studento.
16049 **Burlakova Palaŝko*, Pedteknikumo, studento.
16023 *Ĉerniŝenko Ekamerino*, Pedteknikumo, studento
16105 *Donĉenko Paŭlo*, Pedteknikumo.
16047 *Elizarov Paŭlo*, Pedteknikumo, studento.
16026 *Goj Aleksandro*, Pedteknikumo, studento.
16106 **Gorŝkova Natalio*, Pedteknikumo.
16051 **Inglez Aleksandr.*, Naberejnaja 2/1, studentino.
16034 **Josan Mikolo*, Pedteknikumo, studento.
16044 *Koreckij Gricka*, Pedteknikumo, studento.
16050 **Korzun Mario*, Pedteknikumo, studentino.
16048 **Kotlarevskaja Nino*, Pedteknikumo, studentino.
16029 **Krilova Ano*, Pedteknikumo, studentino.
16021 *Kripak Ivan*, Pedteknikumo.
16027 **Lapunova Gano*, Pedteknikumo, studentino.
16030 **Lebedj Mario*, Pedteknikumo, studentino.
16033 **Lisa Nino*, Pedteknikumo, studentino.
16103 **Lukackaja M. L.*, Pedteknikumo, studentino.
16039 *Miglaĉenko Andreo*, Pedteknikumo, instruisto.
16045 **Mirĉenko Aleks.*, Pedteknikumo, studentino.
16112 *Nesterovskij K.*, Redakcio "Robotnik Kremenĉuĉĉini.
16042 *Pavlenko Fomo*, Pedteknikumo, studento.
16040 *Poŝtarenko Varvaro*, Pedteknikumo, studento.
16035 **Proĥnova Ekaterino*, Pedteknikumo, student
16022 *Radĉenko Leontio*, Pedteknikumo, klerigisto.
16104 **Sapsaj Olgo*, Pedteknikumo, studentino.
16025 **Ŝarŝarkina Mario*, Pedteknikumo, studentino.
16110 *Savustjanenko Fedoro*, Pedteknikumo, studento.
16031 *Semerenko Ivan*, Pedteknikumo, studento.
16107 *Sliva Vasilo*, Pedteknikumo, studento.
16108 **Slusarenko Ludmilo*, Pedteknikumo, studentino.
16037 **Skorobogatjko Ivga*, Pedteknikumo, studentino.
16046 *Stecj Nikiforo*, Pedteknikumo, studento.
16032 *Tolkuŝkin Dmitro*, Pedteknikumo, studento.
16038 *Truŝ Andreo*, Pedteknikumo, studento.
Krivoj-Rog (Sovetio)
16162 *Berkoviĉ Jefimo*, Leninskaja 9, 1. Meduĥovskij, termezuristo.
16159 *Libkov B. S.*, Lenina 70/11.
16160 *Ratnik Lazar*, Glinka 2, maŝinisthelpanto.
Kuĉino (Sovetio)
16118 *Ivanov I. A.*, Saltikovka Daĉnoe, Gidrologiĉeskaja stancia.
Leicester (Britio)
16081 *Hancock F.*, Firfield Avenue Birstall.
Leipzig (Germanio)
16113 *Bauer Reinhold*, Schnorrstr. 32/0.
16325 *Beau Herbert*, Kantstr. 35/4, S 3, ĉarpentisto.
16168 *Brötler W.*, Buttergasse 136-d, W 34, pentristo.
16192 *Grossmann W.*, Pariser Str. 7/3 r., N 22, bakisto.
16084 *Lange Adolf*, Buttergasse 30, W 34, laboristo.
16085 *Polter H.*, Josephinenstr. 19/4 r., C 1, oficisto.
16083 *Walther Hans*, Hofer Str. 86/2 r., C 1, !adisto.
Leisi (Estonio)
16301 *Seppel Albert*, instruisto.
Leningrad (Sovetio)
5552 *Jermolaev I.*, ul. Hercena 40.
16089 **Karabaŝeva Ir.*, Geslerovskij 27-a, kv. 45, 3, farmaciistino.
16088 *Korelov P.*, maristo.
16004 *Paĥomenko A.*, ul. Hercema 40.
12177 *Pastor Julio*, Lubenskaja 8, ĵurnalisto.
Loeben (Aŭstrio)
16096 *Ruppnik Josefo*, Donawitzer Str. 26, seruristo.
Liége (Belgio)
1286 *Muha Viktor*, rue des Fossés 13, kaldronisto.
Lisboa (Portugalio)
16300 *Alves J. A.*, R. Joaquim Casimiro 38—1º—Dto.
Liverpool (Britio)
16290 *Bury G.*, 254 Stanley Park Avenue S., tramisto.
Lodz (Polio)
16098 *Hancberg Jakob*, Wilcza 11, tajloro.
London W 12 (Britio)
16339 **Chilton*, 47 Macfarlane Road.
Los Angeles (Kalifornio, Usono)
16285 *Ege Julius*, P. O. Box 1748.
16287 *Ledeen Hyman*, 930 Rowen Bldg.
Lyon (Francio)
16171 *Andréani*, rue Vauban 77, 6.
15996 *Charbonnel L.*, Cours Lafayette 132, 3, tornisto.
Makeevka (Sovetio)
16316 *Kreĉetov A.*, Dmitrievsk 14, linio 4 pr. d. 61.
16317 *Potana A.*
Manchester (Britio)
16298 **Birch H.*, 42 Kendall Rd., Crumpsall, oficistino.
Marrakeck-Guéliz (Maroko, Afriko)
7534 *Richter W.*, Génie Rural, geometro-topografo.

(Daŭrigota)

TRA LA MOVADO

(Kroniko)

BRITIO. La SAT-klubanoj en Londono faris je 10. 5. monkolekton inter si por aĉeti esp. presliterojn uzotajn en esp. angulo de "Daily Worker", ankaŭ por fari anoncon en "S-ulo" profite al "D. W." Komence, K-do *Sons* donis 10 ŝil. k aliaj altigis la sumon ĝis 1 sterl. Per monpeto ĉe aliaj britaj SAT-anoj ni esperas baldaŭ povi forigi la mankon de supersignoj en "D.W."-angulo. Tiu gazeto tre simpatias al SAT. Ĉiuj britaj SAT-anoj, ankaŭ alilandaj, helpu mondonace, por ke vi povu legi dum kongrestagoj esp.-linvajn novaĵojn en tiu gazeto. Adr. SAT-ano 7472. Daily Worker. 41 Tabernacle St., *London E. C. 2.* — *SOVETIO. Kiev.* En Pola klubo je nomo de Krulikovski okazis granda intern. kunveno de kleriglaborantoj, kiun partoprenis kolegoj plej diversnaciaj. Ĉiuj parolantoj esprimis saman ideon diverslingve. Fine eksonis esp. parolado de Kieva esp. instruisto *Viktorov-Ĉeňoviĉ,* kiu sendis fratsaluton parolan al eksterlimaj K-doj unuigitaj en Edukintern. La rezolucio sendita al Ekzekutivo de Edukintern estis redaktita en esp-o. Dum vespera koncerto aŭdiĝis esp. deklamoj. En Kieva centra Domo de Klerigo fondiĝis nova esp. rondo el pedagogoj. Gvidas K-do Vikt.-Ĉeňoviĉ. Same novaj rondetoj en div. laborlernejoj. (5627, 4544). — Lastsomere ni gastigis kelkajn prol. turistojn-esp-istojn germanajn, politelmigrinton el Jugoslavio, 2 Ĉeňoslovakajn K-dojn k grupon da instruistoj k laboristoj el Ameriko. Oni akcelas ĉi tie eksterland-turismon; eldoniĝis gvidlibro tra Kiev en pluraj lingvoj, ankaŭ *en esp-o.* Same estos pendigitaj specialaj afiŝoj kun necesaj sciigoj ĉe stacidomo, en div. lingvoj *k esp-o.* Esp-lingvaj pri-turismaj resumoj ĉiusemajnaj ĉe Kieva sendstacio (800 m) depost jan. 1930. Esp.-istoj vizitontaj Kievon havos favorkondiĉojn rilate al vizito de muzeoj, tramveturo, loĝado ktp. Filio de "Ukrainia Ekskurs-Kompanio" aranĝis esp. fakon en sia ekspozicio. Ĝia prezid. (K-do Steblovski) ekinteresiĝis pri esp-o. (5627). — *Niŝni-Novgorod.* 15. 9. 29 komencis funkcii 2 rondetoj en 7-a duagrada lernejo (je nomo Kropotkin), po 15 p., gvidas G. A. Konovalov k E. G. Polakova. En nov. ekfunkciis rondetoj ĉe N-Eskorta Bataliono (10 p.), 2-a-grada lernejo de 1. majo (10 p.), Sverdlov-klubo, studentoj de Ŝtata Univers. (15 p.). En dec. — ĉe 2-a-grada lernejo je nomo Bakunin (12 p.), Klubo de Ligilo (Podbelski) (18 p.), Urba Reg. Kom. de Junkom. Ligo (25 p.), Landa financa fako (10 p.), N-Radio Regimento (14 p.), Metalista Klubo (Gorki) (20 p.), 2-a sepj. lernejo je nomo Lunaĉarski (15 p.), Krinov-Klubo en Miza (18 p.). En jan. — Komunumlab. klubo (10 p.), Tatara klubo (15 p.). Sume en 15 kursoj komencis studi 222 p. Kulturfako de *Niĵkrajsovprof* (Intersindik. Konsil.) dissendis al ĉiuj distr. konsilantaroj k al ĉiuj kluboj de urboj Granda Niŝni Novg., Balaňna, Dzerĵinsk k Bogorodsk cirkuleron pri subteno al laboro de esp. rondetoj en kluboj. Gazetoj anoncis kursmalfermon en *Kanavino* por partia k profesia aktivularo, por internacilaborantoj ĉe Junkom. Komitato same. Junkom. gazeto "Leninskaja Smena" ricevis ĉ. 20 let. sekve de anonco en "S-ulo" el div. landoj. Ili presiĝis je 18. 10. 29. Pri k peresp-aj notoj aperis en entreprenaj presĵurnaloj (*Igla, Gudok Melstroja, Leninec, Krasnij Sormoviĉ*). Praktikan per-esp. laboron ĉe kudrofabr. (*Ŝvejprom*) gvidas K-do Vaulin. En lasta kvaronjaro 1929 sume presiĝis ĉ. 35 leteroj en gazetoj. En sept. okaze de junular-tago okazis kunsido en Klubo de Ligilo (Podbelski), kie K-do Kalaŝnikov A. salutparolis pri esp. (300 partopr.). Nian laboron malutilis kursoj en angla k germana lingvoj (ekz. ĉe fabriko "Ruĝa Etno"), ĉe fervojistoj k transportistoj. Je 21. 2. malfermo de perfektiga kurso kun 12 p. (Lerniloj: Ŝabarin-krestomatio k "S-ulo"). "S-ulo"-abonantoj je 1. 3. 30 — 28, SAT-anoj 22. — *Vjaĉeslav Kalaŝnikov (1125).*

La Materialista Ligo de Belgio (prol. liberpensularo)

akceptis en sia kongreso en Laeken (27. IV.) jenan rezolucion pri esp-o: "La Ligo ... decidas disvolvi sian propagandon por esp-o, esprimas la deziron, ke ĉiuj ĝiaj membroj studu tiun ĉi lingvon; komisias la C. K. interrilati kun FEO (LEA) por la organizado de kursoj; sendas sian fratan saluton al ĉiuj prolet-esp-istoj de l' tutmondo."

ĈE LA NEŬTRALULOJ

La Stokholma Ekspozicio en somero 1930 faras reklamon en eksterlando ĉefe per esp-o; ekz. en Estonio la tutan pri-ekspozician reklamon prizorgas Esp. Asocio de Estonio. Estas fonditaj esp. turismaj komitatoj en Stokholmo k Tallinn, kiuj aranĝos reciprokajn amas-ekskursojn. Same en Svedio kiel en Estonio la homoj lernas esp-on por viziti la reciprokan landon (15 428).

La Londona neŭtrala esp. klubo estas kredeble nun la plej granda en la mondo, havanta pli ol 300 membrojn. Nuntempe okazas 9 kursoj en la klubo, kiu aranĝos postkongresan kunvenon en aŭgusto, post la Oksforda universala kongreso.

D-ro J. Buchanan en Londono postlasis testamente la sumon de 4000 anglaj funtoj (ĉ. 20 mil dolaroj) por aranĝo de esp. kursoj ĉe la universitato de Liverpool.

Esperanto en elementaj lernejoj de Holando

La centra esp-ista komisiono de *Nijmegen* adresis al la komunumoj alvokon por lernigi esp-on en la elementa lernejo. Rezulto: dek komunumoj respondis favore: Maestriĥt, Nijmegen, Begen, Arnhem k. a. Aliaj komunumoj disponigas ejojn por kursoj k konsentas subvenciojn.

La okulo de Amsterdamo.

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Gazetoj ktp.

Sennacieca Pedagogia Revuo. Jaro 1, Kajero unua. Marto 1930. Dumonata. Eld. SAT. Redakcio: 14, avenue de Corbéra, Paris XII. Administracio: Colmstrasse 1, Leipzig O 27. Ĉiujn manuskriptojn oni sendu al la komisiita redaktoro H. Stay, 18 A Grand Avenue, Bournemouth, Hants., Anglio. Formato: 15×23 cm. 32 pĝ. Abontarifo jara sur la bazo de ½ dolaro (2 mk. g.).

Detala recenzo pri tiu nova revuo de SAT ŝajnas malnecesa ĉe la legantoj de "S-ulo", el kiuj granda parto alportos al tiu nova SAT-entrepreno la saman konfidon k subtenon kiel al la ĝis nun efektivigitaj. Ni limigu nin mencii, ke jenaj rubrikoj stariĝis jam ĉe la unua kajero: Nova Pedagogio — Sur edukista batalfronto — Tutmonda Esp. Pedag. Servo — Edukisto kontraŭ pastro — Por edukistinoj — Ni gestudentoj — Nia SAT-edukista sekcio. Enkonduke ni trovas tre detalan klarigon pri celo k programo de la revuo. Ankaŭ ilustroj ne mankas en la n-o. Sendube S.P.R. akiros al si iom post iom tiun abonantaron, kiun ĝi bezonas por disvolviĝi k prosperi.

Tutmonda Intersteno. N-o 1. Febr. 1930. 1-a jaro. La Internacional-stenografio disvastiĝis lastatempe tre rapide, k — ni ne forgesu akcenti tion — dank' al esp-o tra la tuta mondo (ankaŭ SAT-anoj alproprigis al si tiun sistemon multnombre, laŭ nia scio). Ĉi tiu esp. lingva monata bulteneto estas la oficiala organo de ĵus fondita Tutmonda Intersteno-Asocio.

Formato: 14×22 cm. 4 pĝ. Jarabono: 2 mk. g.). (kun Multlingva Intersteno — 3 mk. g.). Eld.: Instituto de Internationalstenografio, Friedenst. 79, Duisburg (Germ.).

Monda Kuriero. Ilustrita semajna organo por komerco, trafiko, industrio k ĉiuj aliaj branĉoj de monda ekonomio. Sarajevo (Jugosl.) Poŝtfako 131. Marto 1930. N-o 1. Jarabono: 5 svis. fk. 8 pĝ. 23×31 cm.

Tiu revuo estas destinita servi al komercaj firmoj, foiroj, hoteloj, bankokoj, asocioj, turismaj entreprenoj

ktp. por reklami k disvastigi per esp-o sian reklamon tra la tuta mondo (krom sovetaj respuplikoj, rimarkigas la Admin. de l' gazeto), estas dissendata al tiaspecaj entreprenoj en pli ol 60 landoj.

La Nova Nordo. N-o 1. Marto 1930. Esp. informilo de Internacia Koresp-ond-Oficejo. "Pravda Severa". Adr.: USSR, *Arĥangelsk,* Poŝtkesto 20. 3-paĝa hektografita bulteneto celanta starigi kolektivan korespondadon k servanta per prisovetiaj informoj.

Budapesta Jubilea Foiro, 3. ĝis 12. majo 1930. Prospektoj k afiŝo en esp-o, multkoloraj.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

L' Etincelle, Anderlecht, 30. 4., Socia vivo en Aŭstrio, *Uj Elöre,* Novjorko, 29. 4., Tago el mia vivo (283), *Le Réveil Ouvrier,* Nancy, 3. 5., Loĝejkonstruo en Vieno (290).

Priesper. artik. k notojn enhavis:

L'Eclaireur de l' Ain, Oyonnax, 20. 4., *L' Effort,* Lyon, 3. 5., *L' Etincelle,* Anderl., 31. 3., *Sport et Socialisme,* Liège, 14. 4., 28. 4. (kurso), *Le Prolétaire,* Liège, 3. 5. (kurso), *Le Semeur,* Falaise, 8. 5. (FEO-kongr.), *Le Réveil Ouvrier,* Nancy, 10. 5. (FEO-kongr.), *Bicikla gaz. Solidarität,* Offenbach, 1. 4., 1. 5., *Socialdemokraten,* Stokholm, 7. 5. (kurso), *Arbetaren,* Stokh., 7. 5. (kurso), 3. 5. (anonco pri kurso), *Signalen,* Stokh., 8. 5., *Daily Worker,* London, 10. 5.

Pri SAT-Kongreso raportis:

Socialdemokraten, Stokholm, 7. 5.

Peresper. materialon enpresis:

L' Eclaireur de l' Ain, Oyonnax, 4. 5., *Uj Elöre,* Novjorko, 21 3., 28. 4., *Le Travailleur Alpin,* Grenoble, 3. 5., *Le Réveil Ouvrier,* Nancy, 30. 4., 14. 5., *L' Internat. de l' Enseignement,* Paris apr.

NIA POŜTO

7599. — Kial mi ne plu *Inter-ni*-as? Pro manko de tempo, pro timo herezumi, k ankaŭ pro malemo ĉe la konstato, ke kelkiuj ne volas aŭ ne povas ĝuste kompreni miajn vortojn. — E. L.

1125. — Viaj raportoj k konsiloj sendube aperos sinsekve; n-ojn 6 k 7 ni transsendis al red. de "Virina paĝo". Pro la ĵurnalo turnu vin al K-dino 4227 en *Tallinn.*

12 310. — "S-ulo" ne estas turista organo k sekve nur esceptokaze ni povus akcepti tian materialon k nur se ĝi estas vere interesa.

11 431. — Ni uzos en "L.L." viajn problemojn, ankaŭ la antaŭe senditajn. Kantojn kun muziknotoj (pro la kosto) ni presigas nur escepte, k sen la notoj ili ne multe utilas al nesovetianoj. Eble ni uzos en speciala okazo.

9310. — "Ni ne dormu" aperos baldaŭ. La trad. nur en okazo de bezono.

5627. — Alvoko pri interŝanĝo ne senpage enmetebla.

16 285. — Ni uzos vian artikolon.

Al la K-doj, partoprenontaj la afiŝkonkurson. Ni sciigas vin, ke la formato de l' afiŝo estu: 43×55 cm k ĝia duoblo: 86×110 cm. (La unua nombro indikas la larĝon, la dua la alton). La preso estos tri-kolora. Pluajn detalojn vi legos en artikolo aperonta en la sekvanta n-o.

11 128. — Via raporto en venonta n-o. — Red.

12 014. — Via artikolo aperos. Pri la aliaj, kiujn vi projektas, ni ne povas findecidi antaŭ ol esti legintaj ilin; ni povas do respondi, ke *principe:* jes. Rilate gramatikon k stilon ne timu: estas la tasko de nia redaktoro zorgi pri tio. — E. L.

Al ĉiuj abonantoj. — N-o 294 de "S-ulo" elĉerpiĝis. Ni petas tiujn, kiuj ne kolektas "S-ulo"n, ne forĵeti ĝin, sed konservi aŭ resendi ĉi n-ron al la Adm.

Adm.

KORESPONDADO

SOVETIO

Adresŝanĝo. — K-do Johano Kulikov, Ĥarkovskaja 3, Obŝĉeĵitie FZU, *Dnepropetrovsk* (antaŭe en Sartana), kĉl, L, PI, PK, il gaz.

K-do Glazirin "Pimzavod 2", *Barnaul,* Siberio, kĉl, pri div. temoj. Certe resp.

K-do A. Aleksandrov, *Stalin,* Tolmenka regiono, Barnaula distr., kĉl, pri ĉ. temoj.

K-dino Ŝumilova, Komunalnaja 9, *Barnaul,* Siberio, kĉl, pri junul. vivo.

— Gelaboristoj k oficistoj koresp. kĉl. Gek-doj pri div. temoj. Resp. nepra. Adr.: *Barnaul,* Zavkom Ŝvejnikov (kudrista fabrikkomitato), Gogolstr. 44.

K-do Bazilio Vlasov, Finkelsteinstr. 38, *Taŝkent,* kĉl. radioamatoroj-mallongonduloj.

— Lokomotivtenejo, sporta grupo k komjunularo koresp. kĉl. Adr.: *st. Kinel,* okolo Samara, Klubo de Ĉiĉerin.

Granda dusemajna gazeto

"Sur Kultura Fronto"



priservanta kleriglaborantojn de lernejoj, fabrikoj k vilaĝoj en Malsupra Apudvolgio, bezonas skizojn, artikolojn, fotojn pri div. demandoj de pedagogia k kulturkleriga laboro inter infanoj k maturuloj. Ĝi mem pretas liveri similan materialon, kondiĉe ke ĝi estu uzota en revolucia gazetaro. Por ĉiu prespaĝo de aperigotaj koresp-aĵoj oni pagas 6 rubl.; fotoj estas aparte pag. Adr.: USSR., Saratov, ul. Respubliki, 29, ĵurn. "Na Kultfronto".

Laboristoj, komjunuloj k junpioniroj de ĉl.!

Ĉu vi scias pri tio, ke 30 gelernantoj-laboristoj (gejunuloj) de fabriko "Ruĝa Stelo" kun grandega ĝojo k malpacienco atendas de vi L, PK, PI, gaz. por leterverspero, kiun vizitos 5000 laboristoj de nia fabriko k Fabr. Lernejo? Interŝanĝo estas garantiata. Adreso: *USSR. Zinovjevsk, Litejnaja 22 al K-do F. O. Boĵor.*

Por mia filino kaj amikino, junaj instruistinoj (18 j.)

mi serĉas dum kelkaj monatoj restadon en Francio, Anglio, Germanio aŭ Sovetio, kiel helpantinoj en familio, oficejo, infanejo aŭ simila laboro, celas lingvolernadon. Interŝanĝe mi akceptos junulon (aŭ-inon).

Skribu detalojn al K-do M. Harmsen, *Aalsmeer* (Holando). 5679.

Grupo en Polio

de komerc- k vestaĵlaboristoj serĉas seriozan koresp-adon. Temo: profsindikata, junulara, virina, sporta, liberpensula, proleta. Ni ankaŭ peras inter sekcioj de profsindikatoj k. a. proletorganizoj. Adr.: J. Klüger, Ogrodowa, 49 m. 70, *Warszawa* (Polio).

23-jara Kamaradino

deziras koresp. pri politiko k sporto, interŝ. L, PK, PI, PM, fotojn, gazetojn, precipe kun sovetianoj. Adr.: K-dino Helene Michel, Hainewald/Sa., n-o 35 (Germanio).

JARABONO

por membroj . . . 8 mk. g.
por nemembroj . . 9 mk. g.
Ankaŭ ¼-jare abonebla!

ENHAVO:

	paĝo
Hindio kaj la hindoj	393—94
El la lando de la X-a SAT-Kongreso	394—95
Pensoj pri la teroro	395—96
El usona taglibro	396—97
La evoluo sen dio	396—97
Diversaĵoj	397
Tago el la milito	397—98
Diskutejo	398
Por nia meditado	398
Esperanto-Servo	399
Sennaciula Virina Paĝo	400
Tra Esperantio	401—04
Anoncoj, Korespondado	404

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)